

Espero Katolika

LA PAPO FRANCISKO FINE DE LA 52-A EŬKARISTIA KONGRESO EN BUDAPEŝTO



La papo Francisko alveninta la 12-an de septembro 2021 en Budapeŝton

Numero 10-12-2021

Oktobro-Decembro 2021

Sur la kovrilo: La papo Francisko alveninta Budapeŝton la 12-an de septembro 2021

ENHAVO

LA PAPO: KION SIGNIFAS IRI AL JESUO? Homilio de la papo en Budapeŝto	79
KVAR TAGOJ DE LA PAPO FRANCISKO EN SLOVAKIO	82
OKAZIS VIRTUALA KONGRESO DE I.K.U.E.	84
LA SANKTA MAKSIMILIANO MARIA KOLBE. Prelego de Norma Cescotti	89
ANTAŬEN: KOMPETENTE, KURAĜE, RESPONDECE, SINDEDIĈE, KONFIDE, AKCEPTEME KAJ EFIKE	92
ESPERANTLINGVA SANKTA MESO EN ASIZO	93
I.K.U.E. VIGLIS DUM LA VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO	94
85 JAROJ DE LA MARTIRECO DE JOAN FONT GIRALT, PREZID. DE IKUE	94
DIPLOMO PRI ELSTARA AGADO DE UEA AL MARIJA BELOŠEVIĆ	97
MORALAJ ERAROJ DE RUSUJO	98
NI IOM RIDU	100
LA MIRAKLA PERADO DE MARIA – LA IMPERIESTRINO DE ĈINIO	101
LA ĈIELARKA IDEOLOGIO DE OKCIDENTO	105
REIKI - OKULTISMA KURACADO	109
PRELEGO PRI MEMMORTIGO AŬ MEMESTIMO	112

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Švaček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrik - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.



LA PAPO: KION SIGNIFAS IRI AL JESUO?

Homilio de la papo Francisko dum diservo okaze de fino de la 52-a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Budapeŝto

Ĉe Cezarea Filipi demandas Jesuo disĉiplojn: „Sed vi – kiu vi diras, ke mi estas?“ (Mar 8,29). Tiu ĉi demando embarasigas la disĉiplojn prezentanta al ili gravan punkton dum ilia irado kun Majstro. Ili bone konis Jesuon, ne plu estante komencantoj: ili Lin konis estante atestantoj de multaj mirakloj, kaj lia instruo influis ilin, ke ili sekvis Lin ĉien, kien Li iris. Tamen ili ankoraŭ ne samopiniis kiel Li. Mankis decidema paŝo de admiro de Jesuo al lia imitado. Ankaŭ hodiaŭ la Sinjoro fiksante la rigardon al ĉiu el ni, demandas nin: „Sed kiu mi estas por vi?“ Tio estas demando, kiu sin turnas al ĉiu el ni nepostulante nur precizan respondon laŭ katekismo, sed la personan respondon, la respondon per la vivo.

El tiu ĉi respondo eliras renovigo de la disĉipleco. Ĝi okazas en tri paŝoj, kiujn la

disĉiploj faris kaj kiujn povas fari ankaŭ ni: la unua estas heroldi Jesuon, la dua estas distingado kun Jesuo kaj la tria estas iri al Jesuo.

1. Heroldado de Jesuo. Al la demando: „Sed vi – kiu vi diras, ke mi estas?“ Petro kiel reprezentanto de la tuta grupo respondis: „Vi estas Kristo.“ Petro ĉion diras per kelkaj vortoj, la respondo estas ĝusta, sed surprize post tiu ĉi ekkono Jesuo severe ordonas „al neniu pri Li paroli“ (v. 30). Ni demandas, kial tiu ĉi drasta malpermeso? Pro jena konkreta kaŭzo: diri, ke Jesuo estas Kristo, Mesio, estas ja preciza, sed ne plena. Ĉiam ekzistas risko, ke oni anoncados falsan mesiecon laŭ homoj, sed ne laŭ Dio. Ekde tiu ĉi momento Jesuo do komencas revela-cii sian identecon, sian paskan identecon, kiun ni trovas en la Eŭkaristio. Li ekplikas, ke

lia misio devus kulmini, jes, en la gloro de resurekto, sed post trapaso de surkrucita humiligo. Alivorte, ĝi efektiviĝos laŭ Dia saĝo, „kiu,“ diras la sankta Paŭlo, „ne estas de tiu ĉi mondo, nek de la regantoj de tiu ĉi mondo“ (1 Kor 2,6). Jesuo silentas pri sia mesia identeco, sed ne pri la kruco, kiu Lin atendas. Male – rimarkas la evangeliisto – Jesuo komencas „malfermi instru“ (Mar 8,32), ke Filo de la Homo devas tre suferi, esti rifuzita de pliaĝuloj, ĉefpastroj kaj skribistoj, kaj esti mortigita, kaj post tri tagoj releviĝi“ (v. 31).

Vidalvide al tiu ĉi ŝokanta anonco eĉ ni povas miregi. Ankaŭ ni volus potencon mesian anstataŭ krucumita ser-

vanto. La Eŭkaristio staras antaŭ ni por memori nin, kiu estas Dio. Ĝi ne faras tion pervorte, sed konkrete, montras al ni Dion kiel rompitan Panon, kiu sin lasas rompi, disdonadi kaj manĝi. Li estas ĉi tie por nin savi, Li iĝas servanto, por doni al ni vivon, Li mortas. Estas bone lasi nin konsterni per anonco de Jesuo. Kaj ĉi tie malfermiĝas tiu ĉi heroldado de Jesuo, malfermiĝas la dua paŝo.

2. Distingado kun Jesuo. Vidalvide al la anonco de la Sinjoro estas reago de Petro tipe homa: kiam aperas kruco, elvido de doloro, homo ribeliĝas. Kaj Petro, post kiam li konfesis mesian karakteron de Jesuo, estas ŝokita per vortoj de la Majstro strebante Lin forturni de la plua vojo. La kruco neniam estas mode akceptata, karaj gefratoj, hodiaŭ same kiel en pasinto. Sed ĝi sanigas nian internon. Ĝuste antaŭ la Krucumito ni travivas bonfareman internan batalon, ĉagrenegan konflikton inter „opinio laŭ Dio“ kaj „opinio laŭ homoj“. Unuflanke estas ĉi tie Dia

logiko, kiu estas logiko de la humila amo. La Dia vojo evitas ĉiun entrudiĝemon, ostentecon kaj triumfalismon kaj ĉiam ĝi direktas al bono de aliuloj, kaj tio ĝis sinofero. Duaflanke estas ĉi tie „opiniado laŭ homoj“. Estas tio logiko de la mondo, mondeco, orientita al honoro kaj privilegioj, direktata al



prestigo kaj sukceso, kie gravas signifo kaj forto, tio, kio altiras atenton de plimulto kaj scianta preferigi sin antaŭ aliuloj.

Blindigita per tiu ĉi perspektivo Petro prenis Jesuon flanken kaj komencante Lin admoni (kp. v 32). Antaŭ tio Petro konfesis Jesuon, nun Lin admonas. Ankaŭ al ni povas okazi, ke ni „flankenmetos“ Sinjoron, ke ni Lin ŝovos en angulon de la koro, ke ni plu opinios nin kiel religiemaj kaj bonaj kaj ni iros propran vojon, sen lasi nin regi per logiko de Jesuo. Kaj en tio estas vero: Li nin en tiu ĉi nia interna lukto akompanas, ĉar Li volas, ke ni same kiel la apostoloj elektu lian flankon. Ekzistas Dia flanko kaj flanko de la mondo. La diferenco ne estas inter kredantoj kaj nekredantoj. Principa diferenco estas inter vera Dio kaj dio de nia egoo. Kiel malproksima estas Tiu, kiu kviete regas surkruce, de la falsa dio, kiu volus regi perforte silentigante niajn malamikojn! Kiel diferenciĝas Kristo, kiu sin proponas nur kun amo, diference de la potencaj kaj venkantaj

mesioj, kiujn la mondo flatas! Jesuo skuigas nin, Li ne kontentiĝas kun nia anonco de la kredo, Li de ni postulas, ke ni purigu nian piecon antaŭ lia kruco, antaŭ Eŭkaristio. Estas bone, ke ni adoradu la Eŭkaristion kaj primeditu subtilecon de Dio. Ni dediĉu tempon al adorado, al maniero de la preĝo, kiun ni tre ofte forgesas. Ni dediĉu la tempon al Eŭkaristio. Ni permesu al Jesuo, al la viva Pano, ke Li sanigu nian fermecon kaj malfermu nin al komunikemo, ke Li sanigu nin el nia rigideco kaj enfermiĝo en si mem; ni liberigu nin el paralizanta sklaveco de pledo de sia bildo inspirante por Lin sekvi tien, kien Li volas nin konduki, ne kien ni volas. Kaj tiel ni aliras la trian punkton.

3. La vojo post Jesuo, sed ankaŭ la vojo kun Jesuo. „Iru malantaŭ min, Satano!“ (v. 33). Tiel Jesuo rekondukas Petron al si, kaj tio per kora kaj forta ordono. Sed la Sinjoro, kiam Li ion ordonas, Li estas vere preparita tion doni. Kaj Petro akceptas gracon fari „paŝon returnen“. La kristana vojo ne estas pelado por sukceso, sed ĝi komencas per paŝo returnen – memoru tion, la kristana vojo komencas per paŝo returnen, per liberiganta orientiĝo eksteren, per eliĝo el pozicio de centro de la vivo. Tiam Petro ekkonas, ke la centro ne estas lia Jesuo, sed vera Jesuo. Konstante li falados, sed de pardono al pardono li ĉiam pli bone ekkonados Dian

vizaĝon. Kaj de senfrukta miro de Kristo li aliros al konkreta imitado de Kristo.

Kion signifas postiri Jesuon? Tio signifas iri dum la vivo antaŭen kun la sama fido kiel Li, ke ni do estas amataj infanoj de Dio. Tio signifas iri sammaniere kiel Majstro, kiu venis por servi kaj ne por lasi sin priservi (kp. Mar 10,45). Postsekvi Jesuon signifas ĉiutage direktigi siajn paŝojn al frato aŭ fratino. Por tio instigas nin Eŭkaristio: senti sin kvazaŭ unu korpo, rompiĝi por aliuloj. Karaj gefratoj, ni permesu, ke la renkontiĝo kun Jesuo en Eŭkaristio nin metamorfozu, kiel Li metamorfozis sanktan Stefanon kaj sanktan Elizabeton. Same kiel ili ni ne kontentiĝu kun malmulto, ni ne kontentiĝu kun la kredo, kiu vivas el ritoj kaj ripetado, sed ni malfermiĝu al skandala noveco de la krucumita kaj resurektinta Dio, la Pano rompita por doni vivon al la mondo. Ni ĝojos kaj ni alportados ĝojon.

Ĉi tiu Internacia Eŭkaristia Kongreso estas loko survoja, sed antaŭ ĉio ĝi estu loko sur komenco de la vojo. Ĉar la vojo post Jesuo nin instigas, ke ni rigardu antaŭen, ke ni bonvenigu rompan punkton de la graco, ke ni ĉiutage en ni vivigu la demandon, kiun same kiel en Cezarea Filipi la Sinjoro adresas al ĉiu el ni, al liaj disĉiploj: Sed vi – kiu vi diras, ke mi estas?

Tradukita laŭ Vatican News



KVAR TAGOJ DE LA PAPO FRANCISKO EN SLOVAKIO

Post ferma liturgio de la Internacia Eŭkaristia Kongreso en Budapeŝto, la papo Francisko dimanĉe la 12-an de septembro vizitis apudan Slovakion, kie li restis ĝis merkredo la 15-an de septembro.

Je la horo 15:30 dimanĉe posttagmeze la 12-an de septembro 2021 la papa aviadilo alteriĝis sur flughaveno en la ĉefurbo de Slovakio Bratislava. La papon Franciskon bonvenigis tie ŝtatprezidentino de Slovakio Zuzana Čaputová, kun kiu ankoraŭ la



papo renkontiĝis iom pli poste por mallonga persona interparolo en flughavena salonego. Poste la papo Francisko translokiĝis al nunciejo por renkonti reprezentantojn de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj agantaj en Slovakio kaj poste antaŭ vespermanĝo okazis privata renkontiĝo kun anoj de jezuita ordeno en Slovakio, kiel tion kutimas fari la papo dum siaj eksterlandaj vojaĝoj.



Lunde antaŭtagmeze la Sankta Patro renkontiĝis en Prezidenta palaco kun reprezentantoj de slovakia ŝtato. De la ŝtatpreziden-

tino la papo ricevis panon kiel simbolon de unueco el multaj grajnoj. En sia alparolo la papo menciis, ke li venas kiel pilgrimulo en junan landon kun delongtempa historio, kun profundaj radikoj lokigitaj en la koro de Eŭropo. Laŭde li ankaŭ menciis senkonfliktan dividon de Ĉeĥoslovakio antaŭ 28 jaroj. Sekve la papo renkontiĝis en katedralo kun episkopo, pastroj, geordenanoj kaj katekistoj.

Lunde okazis renkontiĝo kun fratulinoj de Patrino Tereza, juda komunumo kaj kun politikistoj.

Marde la papo vizitis grekkatolikojn, junularon kaj romaan minoritaton en Prešov kaj Košice.



La apostola vojaĝo de la papo Francisko kulminis merkredon en Baziliko de la Sepdolora Virgulino Maria en Ŝaŝtín.

La lastan tagon de la apostola vojaĝo komencis la papo Francisko per preĝo kun la slovakaj episkopoj en baziliko de Sepdolora Virgulino Maria en Ŝaŝtín. Post tio dum ĉeesto de ĉ. sesdek mil kredantoj li celebris la sanktan meson en terspaco antaŭ la sanktejo.

En la liturgia memoro de la Virgulino Maria Dolora ĉiujare en Ŝaŝtín okazas tradicia pilgrimo al tiu ĉi patronino de Slovakio, kiun tiel proklamis papo Pio la XI-a en la jaro 1927. En la jaro 1964 la papo Paŭlo la Sesa altigis la sanktejon en Ŝaŝtín je baziliko minor. La skulptaĵon de la Virgulino



Maria Sepdolora donis el piruja ligno pretigi Angelika Bakičová, edzino de mastro de Šaštín, la grafo Imrich Czobor, kiel esprimon de dankemo por konvertiĝo de la edzo. Ne hazarde ĉi tie la kredantoj sin turnas al la Patrino de Dio antaŭ ĉio en familiaj aferoj. La sanktejon de Šaštín ĉiujare vizitadas miloj da pilgrimuloj. Vizitis ĝin ankaŭ Patrino Tereza el Kalkato kaj la sankta Johano Paŭlo la Dua, kiu ĉi tie en la jaro 1995 celebris la sanktan meson dum sia apostola vojaĝo en Slovakio.

En la preĝo, per kiu sin turnis al la Dolora Patrino la papo Francisko kune kun la slovakiaj episkopoj, li petis por sanigo de vundoj kaj konfidis al ŝi Slovakion eĉ komunecon inter ĝiaj paŝtistoj.



La apostolan viziton de Slovakio fermis liturgio el festo de la Virgulino Maria Sepdolora, patronino de Slovakio, kiu estas ankaŭ la ŝtata festotago de Slovakia Respubliko.

En spaco antaŭ la baziliko de Šaštín kolektiĝis ĉirkaŭ sesdek mil kredantoj, kiujn la papo dum duonhoru salutis el papamobilo.

Kun la anstataŭanto de Petro kuncelebris la sanktan meson naŭdek episkopoj, inter ili estis multaj el la Ĉeĥa Respubliko, kaj pli ol kvincent sacerdotoj. Al ĉefaj kuncelebrantoj en proksimeco de la papa altaro apartenis ankaŭ emerita ĉefepiskopo de Trnava Róbert Bezák, kiu kun la papo renkontiĝis jam lunde la 13-an de septembro, kiam lin la papo kun liaj parencoj akceptis en Apostola nunciojo en Bratislava.

Konklude de la liturgio al la papo Francisko dankis por lia vizito metropolito de Bratislava, la ĉefepiskopo Stanislav Zvolenský, kaj fine la papo sin turnis al la ĉeestantoj kun vortoj de dankoj. Eksplicite li poste taksis ĉeeston de la slovakia ŝtatprezidentino kaj de membroj de la Ekumena Konsilio de Eklezioj. Li finigis sian viziton de Slovakio per jenaj adiaŭaj vortoj:



„Ekestis momento de adiaŭo kun via lando. Dum ĉi tiu Eŭkaristio mi dankis Dion por lia donaco, kiu estis mia vojaĝo al vi, kaj por tio, ke mi povis ĉi tiun vojaĝon finigi en pia ĉirkaŭbrako de via popolo kaj kun ĝi festi religion kaj ŝtatan feston de via patronino, la Dolora Virgulino. Elkore mi dankas vin, karaj fratoj episkopoj, por tuta preparo kaj akcepto. Ripete mi esprimas dankon al la ŝtatprezidentino kaj al ŝtataj oficoj. Mi dankemas ĉiujn, kiuj diversmaniere tiuvoje kunlaboris, kaj tion precipe perpreĝe. Kaj ĝojigas min, ke mi denove povas saluti membrojn de la Ekumena Konsilio de Eklezioj, kiuj honorigis nin per sia ĉeesto. Mi portas vin ĉiujn en la koro. Mi dankas al ĉiuj!”

OKAZIS VIRTUALA KONGRESO DE I.K.U.E.

En la semajno de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2021 okazis virtuala kongreso de IKUE (ĉe la platformo ZOOM) kun la ĉeftemo „Nia dua jarcento: ni alfrontu la defiojn kun kuraĝo, respondeco, sindediĉo, konfido kaj akceptemo”. La kongreson organizis kaj lerte gvidis la prezidantino de IKUE fratino Marija Belošević el Kroatio. El 71 aliĝintoj la kongreson partoprenis 57 personoj el Eŭropo, Sudameriko, Azio kaj Afriko. Ĉiutage la kongreso komenciĝis je la 16-a horo (MET). Gravus substreki, ke la informo pri la kongreso estis vaste diskonigita, ne nur ene de IKUE-rondo. Krome, iuj trovis intereson kaj partoprenis malgraŭ la malsamaj horzonoj, kaj iuj sekvis la programon feriante kaj vojaĝante.

La tagaj programoj komenciĝis per meditojn, kiujn pretigis sac. Albert Reiner, fra Patrik Rygiel, OFMConv. kaj sac. Serhij Prudko. Post la meditoj sekvis la muzika rondo gvidata de Albert Kronenberger. La lastaj eroj de la tagaj programoj estis la Rozario - por la paco en la mondo, por ĉesigo de la pandemio kaj ĝiaj viktimoj, kaj por el-

peto de bono por IKUE.

Dum la kongreso okazis ankaŭ kelkaj foto-ekspozicioj de la IKUE-anoj kaj aliaj E-istoj Željko Grganić, Kroatio (Kruco, Kroataj sakralaj konstruaĵoj), Vera Fabris, Kroatio (Preĝejoj kaj sonorilturoj en Istrio), Krešimir Belošević, Ratimir Delorko kaj Željko Vurm, Kroatio (Procesioj kaj festoj), Gordana Plavšić kaj Jelica Stipaničev Mustapić, Kroatio (Preĝejoj kaj sonorilturoj) kaj Andrej Šegula, Slovenio (Preĝejoj).



Sac. Albert Reiner

Sabaton, la 14-an de aŭgusto:

La kongreso komenciĝis per la bonvenigaj vortoj de la fratino Marija Belošević.





KOLBE-TAGO

iniciato okaze de la 85-datreveno de la martira morto

Sankta Maksimiliano Kolbe, ĉiela patrono de IKUE

**ĉiun 14-an tagon de la monato per ZOOM
je 20.15 (UTC+2 somera/UTC+1 vintra)**

prelego, medito, preĝo

aliĝo: ikue.reto@gmail.com



Komenco de la kongreso okazis en la tago, kiam la Katolika Eklezio memoras martiron la sanktan Maksimilianon Maria Kolbe, kiu ankaŭ estas unu el la patronoj de IKUE. Tial la kongresa programo de tiu ĉi tago estis plejparte dediĉita al la sankta M. M. Kolbe per programero E-martiroj de la 20-a jarcento (la jarcento de totalitaraj reĝimoj), kiun prezentis Marija Belošević. Sekvis la programero Sankta Maksimiliano Kolbe, patrono de IKUE, de Marija Belošević el Kroatio kaj Norma Cescotti el Italio. Kaj la trian programeron „Joan Font I Giralt, prezidanto de IKUE”, prezentis fratino Marija.

Al la sankta M. M. Kolbe estis ankaŭ dediĉita poemo Tie la senŝanca vivo venkis de Cristian Mocanu el Rumanio. Sekve de tio fratino Marija metis la demand-programeron „Kiel igi la IKUE-patronojn kaj martirojn pli konataj?” Evidentiĝis, ke la katolikaj esperantistoj mem malmulton scias pri la unuopaj patronoj, kaj eĉ malpli pri martiroj, E-katolikaj. Pro tio subtenindas la iniciato, ke oni faru ilin pli konataj en ne nur katolika, sed ĝenerala E-movado, al kiu pluraj inter ili grave kontribuis.

Al la programo dum tiu tago bele kontribuis per eta koncerto Luis Obando kaj Ja-


hir Cataño kaj koruso Prismo (Kolumbio).

Dimanĉon, la 15-an de aŭgusto:

La tri filmoj Koreaj martiroj, la meso dum la UK en Seulo, memoro pri Lee Chong-Yeong preparitaj de LEE Nak-kee la kongresanojn sciigis pri la vivo de la koreaj esperantistoj, katolikoj.

Plua programero estis prelego de Katarina kaj Milton Paulo de Lacerda el Brazilo „Kio estas la tempo?”


Ege interesan atesto-diskuton pri la reveno al la Katolika Eklezio oni povis aŭskulti inter José Antonio Vergara, Ĉilio kaj sac. Albert Reiner. Tio estis bona enkonduko al la



Prelegas Jose Antonio Vergara

ĝenerala diskuto pri temo „Vivi la kredon en la sekulara mondo”, kiu certe postulas pli da atento ankaŭ inter E-katolikoj.

Tiutaga koncerto estis de Ĵomart kaj Naŝa el Svedio.



Prelegantino Barbara Pietrzak

Lundon, la 16-an de aŭgusto:

La prelegon „La misio kaj ties paŝtista ministreco je la lumo de vortoj kaj gestoj de la papo Francisko” prezentis Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos el Brazilo. Sekvis la prelego „Revoj kaj trafaj” de Milton Paulo de Lacerda, kiu estis bona enkonduko al la diskuto „IKUE hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ”. La diskuto estis la okazo prikonsciiĝi pri IKUE kiel asocio kun pli ol centjara historio, kiu dum sia historio havis plurajn turbulentajn

periodojn. Oni pridiskutis diversajn demandojn kaj problemojn de la nuntempa agado de IKUE (internacia kaj de la sekcioj) kaj kiel plej rapide provu solvi ilin.

Mardon, la 17-an de aŭgusto:

La kvaran tagon oni aparte memoris pri iama prezidanto de IKUE Jacques Tuinder okaze de la 10-a datreveno de lia morto (10-an de januaro 1933 - 18-an de junio 2011).

Fratino Mirella De Martini el Italio okazigis programeron „Militaj spuroj, pripaca konscio, memore al la italaj kaj alilandaj partoprenantoj de la Granda milito en provinco Vicenza, Italio”. Post tio sekvis programero Per scivolemo al kapableco de Martina Kvarantan Ŝmitran, Kroatio. Post ĉi tiu programero sekvis Nunaj defioj de la Katolika Eklezio en Kubo de Alberto Garcia Fumero, Kubo.

La prezentaĵon „Supervido pri aktivadoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio dum ĝia tridekjara ekzistado” okazigis Miloslav Šváček, Ĉeĥio. Sekvis la diskuto pri la agadoj de la sekcioj en unuopaj landoj.

Merkredon, la 18-an de aŭgusto:

Dum ĉi tiu tago oni donis apartan atenti-



La programo prezentita de Lisa Gazzola

LA LOKOJ DE LA PAPO SANKTA PIO LA 10-A

Tekstoj tradukitaj de Lisa Gazzola kun la **fotoj** de Luciana Rech kaj Giovanni Gazzola.

Revizio de Giovanni Gazzola.

Aŭdio: Jashkirat Bal Sinh.

gon al la komunikiloj. La programeron „Religiaj temoj en la Pola Radio / Pola Retradio” prezentis Barbara Pietrzak el Pollando.

La programeron „Rememore al Antonio De Salvo” prezentis Edvige Ackermann, Italio kaj Marija Belošević. Gravas mencii, ke Antonio grave kontribuis ankaŭ al la E-komunikiloj, unue kiel redaktoro de la E-elsendo de RAI, ĝis la morto la respondeca redaktoro de Espero Katolika kaj prizorganto de la tekstoj por la dulingva blogo „Esperanto viva”. Pri la Radio Vatikana kaj ties historio prelegis Cristian Mocanu, Rumanio. Kaj en la programero „IKUE-informiloj” pri la revuo Espero Katolika - la oficiala organo de IKUE informis prezentaĵo de Miloslav Šváček. Marija Belošević prezentis aliajn komunikilojn de IKUE (ttt-ejon, E-elsendon de Radio Vatikana, Facebook, Twitter kaj Instagram).

Ĵaŭdon, la 19-an de aŭgusto:

Oni daŭrigis lundan programeron „IKUE hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ”.

Pri Gemono del Friuli „Travivaĵoj de Katedralo” konigis la kongresanojn Edvige

Ackermann.

Pri la Katolika agado per fotoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj konigis la kongresanojn Elda Doerfler, Italio/ELF-AREK. Necesus aldoni, ke tio ne estis nur la prelego, sed vera trarigardo al forgesitaj (kaj nekonataj) eroj el la historio de IKUE. La prelego estis bona bazo por tre fruktodona diskuto, kiu jam rezultis per klara konkludo, ke du organizoj IKUE kaj ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj) havas bonan bazon por la kunlaboro. Ni anticipe ĝojas, ĉar ĝuste la arĥivado kaj historio estas la kampoj, pri kiuj oni ne tro atentis, ĉar la E-kristanan heredaĵon oni trovas dise tra la mondo.

Vendredon, la 20-an de aŭgusto:

Dum la antaŭlasta tago, la kongreso gastigis WANG Tianyi, kiu prezentis interesajn erojn el la historio de E-movado en X'ian, Ĉinio, sed same pri la komenco de la Katolika Eklezio en tiu lando.

Post tio okazis la „Prezento de la portalo Fontoj.net” fare de Albert Kronenberger.


Post tio sekvis programero „Kion ni po-

1910 - Kongreskarto de la Unua Kongreso de Katolikaj Esperantistoj - Parizo - 30a marto - 3a aprilo

Dekstre malsupre estas listo de la Organiza Komitato, kie legeblas nomoj de eminentaj katolikaj esperantistoj, kiuj glorie antaŭenigis IKUE-n:



Rev. Richardson,
Claudius Colas,
baronino de Ménil.



vas lerni de La eta princo?”, prelego kun dis-
kuto gvidita de Marija Belošević.

Por la kongresanoj koncertis Perla Mielo
el Hungario, kiu ankaŭ donis bazajn infor-
mojn pri la hungara reĝo sankta Stefano,
kies festotago estis en tiu tago.

laj aĉete aŭ rete) estis prezentita fare de Ma-
rija Belošević.

Ĉar tiutage estis memortago pri la papo
la sankta Pio la Deko - la ĉiela patrono de
IKUE, tial gravan kaj belan programeron
pri ĉi tiu sanktulo nomitan „Sur la spuroj de
Pio la 10-a” prezentis Lisa
Gazzola, Italio. Al la re-
memoro aldoniĝis komuna
aŭskultado de la Meso ho-
nore al la Pio la 10-a.

Espero Katolika



Estimataj kaj karaj gesamideanoj,
en la tutmonda Esperanto-movado
havas sian lokon ankaŭ la plej
malnova Esperanto-revuo –
Espero Katolika
– ekzistanta ekde la jaro 1903 ĝis
nun, la oficiala organo de la
Internacia Katolika Unuiĝo
Esperantista. Antaŭ ol al ni ĝiaj
titolpaĝoj prezentos sian aspekton
dum la cent dek ok-jara ekzistado,
ni unue koncize konigu nin kun ĝia
ekستا evento.

Kaj proksimiĝis fino de
la Virtualaj Tagoj de IKUE.
Sekvis la oficiala fermo de
ĉi tiu virtuala kongreso,
kaj post ĝi fina danko-pre-
ĝo pere de Rozario. Per tio
la kongresanoj ne devis
forlasi la virtualajn renkon-
tiĝojn, ĉar eblas partop-
reni ilian daŭrigon en for-
mo de la ĉiutaga Roza-

Sabaton, la 21-an de aŭgusto:

Proksimiĝis la lasta kongresa tago. Mar-
tina Kvarantan Ŝmitran el Kroatio okazigis
programeron „De aplaŭdo al konfido” kiel
enkondukon al la konkluda diskuto „IKUE
hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ”. La kongresanoj re-
konis la lastjarajn strebojn por la renovigo
de IKUE kaj spirite kaj organize (strukture,
administre). La fina diskuto pri tiu temo es-
tis ligita al la „Mi kaj IKUE!”: Kion ĝi sig-
nifas por mi; kial mi membras aŭ deziras
membriĝi? Kion mi ricevis de IKUE? Kion
IKUE povos fari por mi (kion IKUE alportis
al mi)? Kion mi povus doni al IKUE kaj al
la katolika E-movado ĝenerale?” Aparte oni
atentigis la antaŭenigon dum la lasta jaro,
kiu danke al la modernaj komunikoj ebligis
ĉiutagajn kontaktojn kaj diskutojn, dum kiuj
pluraj povis doni valorajn ideojn kaj montri
sian pretecon je kunlaboro por la bono kaj
prospero de IKUE.

Programero „E-kristanaj libroj” (akireb-

ria preĝo, post kiu eblas fari ankoraŭ dis-
kuton. Al tiu ĉi ĉiutaga preĝo, kiu ĉiam
komenciĝas je la 20:15 horo de MET es-
tas ĉiuj kore invitataj. Por partopreni tiun
ĉi rozarian preĝon kaj por ricevi bezona-
tan aliron bv. vin direkti al la retadreso:
ikue.reto@gmail.com.

Konklude eblas diri, ke la Virtuala kon-
greso de IKUE bonsukcesis. Grandan dan-
kon ni adresu al Dio kaj kompreneble al
ĝia organizantino fratino Marija Belošević
– la prezidantino de IKUE. Kiu organizis la
kongreson aŭ iun gravan aranĝon, tiu povas
bone imagi, kiom da energio por la preparo
kaj bonsukceso devas esti tiucele donita. Ni
esperu, ke la venonta kongreso de IKUE jam
povos okazi kun persona ĉeesto de la IKUE-
anoj. Ni ne ĉesu peti Dion kaj la ĉielajn pa-
tronojn – la propetantojn de IKUE, por ke
IKUE sukcese eliru el la nune ekzistanta
krizo kaj renovigu sian viglan agadon. Dio
benu nin kaj IKUE-n!

mb, mŝ

LA SANKTA MAKSIMILIANO MARIA KOLBE

La kongresa prelego de Norma Cescotti

Dum ĉi tiuj tagoj okazas la 80-a datreveno de la morto de sac. Maksimiliano Maria Kolbe. La tutmondaj esperantistaj katolikoj elektis lin sia patrono, ĉar li simpatiis al Esperanto kaj kuraĝigis lerni ĝin. Legante lian biografion kaj konante lian tutan agadon oni ekscias pri tio, kio pri li estas konate, ke li estas amata kiel tute aparta patrono, de tiuj ĉi malfacilaj tempoj.

Li naskiĝis la okan de januaro 1894 kun la nomo Rajmondo Kolbe, apud Lodzo, la urbo en la pola zono sub rusa kontrolo. Lia familio estas modesta: la patro, germana, kiu laboras kiel teksisto, la patrino, kiu estas akuŝistino kaj kvar fratoj. Sekve la familio translokiĝas al la urbo Pabianice, kie Rajmondo, frekventante la duagradan lernejon, komencas jam percepti misteran inviton al la religia kaj sacerdota alvokiĝo.

Dektrijarulo, li estas akceptita ĉe la Franciskana Mezlernejo en Leopoli, kiel novico li surmetas veston de la Minoraj Fratoj Konventualaj, alprenante la nomon Maksimiliano.

La sekvantajn tagojn li konkretigas la simplan profesion kaj estas sendita al Krakovo. Kaj poste al Romo por daŭrigi la studojn de filozofio kaj teologio. Li loĝas dum sep jaroj en la itala ĉefurbo ĉe la „Serafa Internacia Kolegio” kaj sin votas porĉiame al Dio en la jaro 1914 kun la nomo Maksimiliano Maria.

En la jaro 1915 li doktoriĝis pri filozofio kaj en la jaro 1919 pri teologio. En la jaro 1918, fariĝinte sacerdoto, li celebras la unuan sanktan meson en la preĝejo de Sankta Andrea delle Fratte.

Dum la jaroj de forĝado, Maksimiliano Kolbe, helpata ankaŭ de sia tre sociala karaktero, sukcesas facile krei amikecajn rilatojn kun samseminarianoj. Li estas animata de forta optimismo kaj de fervorego dum


la religia praktikado, precipe pri la recitado de la rozario kaj dum la adorado de la Sanktega Sakramento.

Dum sia restado en Italio li plenigas kaj pliprofundigas sian spiritan sperton, ligite kun la sindediĉo al Maria, la elemento, kiu sekve karakterizos lian paŝtistan sindevidon.

En la jaro 1917 kune kun kelkaj fratoj li fondas la „Milion de la Senmakula


Virgulino” por disvastigi tra la mondo la sindonemon al Maria, utiligante ankaŭ la tiutempilojn – la gazetaron. Kaj poste radiodissendojn. Li, efektive, ekkonscias, ke li devas sindevigi dum periodo malfacilita de antaŭvido de totalismaj ideologioj establitaj de la industriigo, de materiismo kaj de la evoluigo de komunikiloj.

Dum la jaroj travivitaj en Romo, Maksimiliano estas trafita de la tuberkolozo, kiu akompanos lin dum la vivodaŭro. Reveninte al Pollando, li instruas en la seminario de Krakovo, sed tro rapide li devas forlasi tiun



taskon por kuraci sian malsanon.

En la jaro 1922 aperas la unua numero de la revuo „La kavaliro de la Senmakula Virgulino”, al kiu sekvas poste „La Malgranda Ĵurnalo” – la revuo de reduktita formato.




Post nova restado en malsanulejo por kuraci la tuberkulozon, en la jaro 1927 li fondas en la najbaraĵo de Varsovio monaĥejon, kiun li nomigis „Niepokalanów - La Urbo de Senmakula”, ekipitan per presejo kaj pormisia seminario. Ĉi tie dum la antaŭtagoj de la mondmilito loĝas ĉirkaŭ milo da homoj – votintaj monaĥoj, novicoj kaj seminarianoj. Ĝi estas unu el la plej grandaj katolikaj monaĥejoj en la mondo, preskaŭ memstara urbo, kie dum la jaroj de milito trovos ŝirmon multenombraj polaj kaj hebreaj rifuĝintoj.

En la jaro 1930, kvankam kun febliĝinta korpo pro tuberkolozo, Kolbe, kiel misiisto ekveturas al Ekstrema Oriento. Li haltas mallonge en Ŝanhajo kaj pluvojaĝas ĝis Nagasaki en Japanio. Ĉi tie post unujara restado lernante la japanan lingvon, li eldonas la revuon „Mugenzai no Seibo no kiŝi”. Poste

li konstruigas monaĥejon flanke de monto Hikosan kaj nomumas ĝin „Ĝardeno de la Senmakula Virgulino”. Samjare per letero al la Patro Justin Nazim li skribas: „La Kavaliro Esperanto (Esperanta internacia revuo) trovus ian sukceson eĉ ĉi tie en Japanio”. Tio estas la unua atesto pri lia intereso pri nia lingvo.


En la jaro 1932 li forveturas al Hindio por juĝi la eblon fondi novan Misiejon. Tamen li decidas reveni al Nagasaki por malfermi seminarion en la jaro 1936. Sekve samjare li forlasas definitive Japanion kaj revenas al Pollando. En tiu jaro li diris al la studentoj de la seminario: „Via partopreno al la esperantista movado plaĉas al la Senmakula Virgulino”.

En la jaro 1938 li obtenas licencon pri radioamatoro kaj tial li restas agema dum kelkaj jaroj. En posta jaro li iras al Cetonio kun la celo krei novan „Urbon de Maria”. Bedaŭrinde en Eŭropo la situacio abrupte ruiniĝas. Pollando estas okupata de la nazioj kaj Kolbe estas arestita de la germana sol-



dataro kune kun aliaj 37 kunfratoj. Post preskaŭ trimonata kaptiteco Kolbe estas liberlasita kaj li revenas al la „Urbo de Senmakula” apud Varsovio. Sed li trovas ĝin bombardita kaj aliigas ĝin je malsanulejo kaj koncentrejo por miloj da rifuĝintoj.

Tamen lia libereco estas mallongdaŭra. En la jaro 1941 Kolbe estas definitive arestita fare de Gestapo, kiu kondukas lin en koncentrejojn de Auschwitz. Ĉi tie li estas destinata por la humiliga transportado de kadavroj kaj estas plurfoje bastonata. Samjare li estas translokita al la dekkvara bloko kaj engaĝita en la falĉ-rikoltado.



La forkuro de iu kondamnito kaŭzas reprezalion fare de la naziistoj. Tiuj decidas selekti dekon el la malliberuloj kaj sendi ilin al la morto en la tiel nomita „Bunkro de la malsato”. Tuj, inter la selektitoj iu ekplore gas kaj plorsingultante diras, ke lia edzino kaj liaj filoj estas lin atendantaj hejme. Subite, el la vico de la malliberuloj eliras Kolbe proponante sin mem anstataŭ lin.

La interŝanĝo estas akceptata kaj Kolbe estas enfermita en la bunkro de malsato. Post dusemajna agonio, sen akvo kaj nutraĵo, ses kunkondamnitaj mortas. La ceteraj kvar, inkluzive de Kolbe sukcesas transvivi daŭre kantante himnojn al Maria. Tio multe incitas la karcergardistojn.

La dekkvaran de aŭgusto, en la antaŭtago de la festo de la Ĉielenpreno de Maria Kolbe kun la kunuloj estas mortigita per enveja injekto de fenolo. Kolbe, etendante la brakon al Hans Bock, la ekzekutisto komisiita plenumi la mortigan injekton, diras: „Vi nenion komprenis pri la vivo..., la malamo utilas al nenio..., nur la amo kreas”, kaj iliaj lastaj vortoj estis „Ave Maria”. Iliaj korpoj estis kremaciitaj kaj la cindro disŝutita.

Antaŭ kelkaj jaroj, okaze de IKUE-kongreso en Pollando, mi vizitis la koncentrejojn de Auschwitz. Mi eniris en la tribunalejojn, kie post tre strikta pridemandado oni kondukis la kondamnitajn en la korton por ilin torturi per palisumo, por ke ili parolu, lasante la silentemulojn tiel, duonvestitajn, svinge pendantajn la tutan nokton, kiu tie, vintre, estas akre malvarme. Multaj el ili mortis. La postvivintoj, inter ili ankaŭ Kolbe, estis rekondukitaj en la subteraĵon por morti pro malsato kaj soifo.

Mi malsupreniris tien kaj haltis, skuiĝanta, antaŭ la ĉelo de la morto, kiel klarigis la gvidistino, estis tiu de Kolbe. Mi enmemiĝis en tiun lastan penigan momenton de lia vivo kaj kaptis min tiom forta emocio, pro kiu mi ne povis reteni la larmojn.

„Nur la amo kreas”, plurfoje memorigis la Papo Paŭlo la Sesa, la dekan de oktobro 1971 okaze de la beatigo de Patro Kolbe.

„Martiro de karitato”, proklamis lin papo Johano Paŭlo la Dua la dekan de oktobro 1982 okaze de lia kanonizo.

(Iujn fotojn faris en Niepokalanów, Pollando, Marija Belošević.)

ANTAŬEN: KOMPETENTE, KURAĜE, RESPONDECE, SINDEDIĈE, KONFIDE, AKCEPTEME KAJ EFIKE

Se ni ne estas dankaj por tio, kion ni havas, kial ni pensas, ke ni estos pli feliĉaj havante pli? Nedankemulo vidas nur sin mem, kaj dankemulo vidas Dion kaj proksimumon. Se ni ne kapablas mastrumi tion, kion ni nun havas, kial ni estus kapablaj havante pli? Nek mono, nek iu havaĵo kunportas la feliĉon! Jes, eble tio alportas la portempan, ŝajnan kontentigon, sed ni forgesas, ke ĉion ni ricevis kiel donacon, kaj por la bono por ni kaj niaj proksimumoj kaj ke ĉion ni devas prizorgi kun granda atento.

En la hodiaŭa, ĉiam pli rapidiga vivmaniero oni forgesas pri aliuloj, pri proksimumoj. Relativismo kaj egoismo ekregis la mondon, nian mondon. Foje ŝajnas, ke la vortoj: „dankon“, „pardonu“, „mi bezonas helpon“, „mi ne povas“ malmodas.

Ĉu ĉio ĉi iel influas IKUE?

Ni ĉiuj estas homoj kun niaj vivoj: familiaj, profesiaj, sed same, se ni iam decidis aliĝi al IKUE: ĉu ankaŭ IKUE estas parto


de nia vivo? Kion IKUE signifas por mi? Kion mi ricevis de IKUE? Kion mi donis kaj pretas doni al kaj por IKUE? Ĉu en IKUE mi agas por la bono de IKUE-komunumo aŭ por mia persona prospero (profito)?

IKUE, kiel pluraj aliaj asocioj baziĝas sur libervola (nepagita) agado. Tamen, ni ne forgesu: se ni libervole surprenas iun taskon, ni devus ĝin respondece plenumi. Libereco kaj respondeco apartenas al la bazaj trajtoj de la kristana moralo!

IKUE staras ĉe la vojkruciĝo: kiun vojon preni?

Dum pluraj periodoj de sia historio, IKUE estis en la kriza stato, kiu plej ofte estis kaŭzita de la „eksteraj“, sociaj kialoj. Sed feliĉe, dank‘ al Dio, niaj prauloj komprenis la situacion kaj ili sukcesis trovi la ĝustan vojon. Kaj ni nun? Ĉu ni konscias pri la problemoj? Mi kuraĝus demandi eĉ pli rekte: ĉu tiuj problemoj entute interesas nin?

Iuj dirus pandemio. Kaj mi klare respon-



ROZARIO

kunpreĝado per ZOOM

**POR IKUE, POR PACO EN LA MONDO,
POR FINO DE LA PANDEMIO**

ALDONE: PRELEGETOJ

ĈIUTAGE JE LA 20.15H (UTC+2)

aliĝo:

ikue.reto@gmail.com



dos: Ne! Ni ne rajtas akuzi la pandemion. La problemoj de/en IKUE amasiĝis dum la jaroj. Eĉ ni povus diri male: la pandemio alportis al ni ion bonan. Ĝi alportis al ni la eblon krei komunicon, kiu fortiĝas de la tago al la tago. Tiu komuneco havas forton en la preĝo, intensa preĝo, kies fruktoj iom post iom aperas. La pandemio malfermas niajn okulojn, kaj ni de la tago al tago pli klare vidas: kiaj ni estas, kiuj ni estas, kiom mi estas, kion ni havas. Kaj ni konsciu: tion ankaŭ observas la personoj ekster IKUE!

Unu inter niaj plej gravaj defioj estas elekti la novan estraron, t.e. la teamon, kiu kompetente, kuraĝe, respondece, sindediĉe, konfide, akcepteme kaj efike gvidos kaj modernigos IKUE. Mi certas, ke eblas krei tian teamon, ĉar nur per tia estraro IKUE po-

vus iri antaŭen kaj transformiĝi al la asocio, kiu estos kapabla respondi al la defioj de la tempo.

Normale, por ĉiuj bonvolaj personoj estas loko en IKUE. Oni ne nepre devas esti en la estraro por doni iom da de sia tempo kaj kompetentoj por la bono de IKUE. Dum la historio, kaj ankaŭ nun multas personoj, kiuj diversmaniere kontribuas al tio, ke IKUE vivu kaj antaŭen iru. Jes, ni provu pensi pri la komuna bono, por prospero de IKUE.

Kaj ne forgesu: en preĝo fontas nia forto.

La pordoj de ZOOM-ĉambro estas malfermitaj ĉiutage je la 20.15 horo (UTC+2, somera tempo/UTC+1 vintra tempo). Same, viaj sugestoj bonvenas (sendu ilin rete: ikue.reto@gmail.com).

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

ESPERANTLINGVA SANKTA MESO EN ASIZO

En Asizo inter la 20-a kaj 27-a de aŭgusto 2021 okazis la 88-a Itala Kongreso de Esperanto organizita de la Itala Esperanto-Federacio. La ĉeftemo de la kongreso estis „Sankta Francisko kaj la prediko al la birdoj: komunikado inter malsamuloj kiel vojo al paco“.

La duan tagon de la Kongreso, sabate la 21-an de aŭgusto en la kapelo de la baziliko de Sankta Maria de la Anĝeloj (Porciunkula) okazis la sankta meso en Esperanto. La ĉefcelebranto estis fr. Benoît Ente, OP (Francio) kaj kuncelebranto sac. Kazimierz Noculak (Pollando). La meson organize nome de IKUE prizorgis la prezidantino Marija Belošević.

Dum la kongreso la seminarion “Sankta Francisko kaj la lupoj: paco kaj milito en la nuna mondo” prizorgis Renato Corsetti. La seminario estis okazo pridiskuti plurajn aspektojn de la paco (kaj milito) en la nuna mondo.

(Fotis Tiziana Fosatti →)

Dum la ekskursoj la kongresanoj povis ekkoni i.a. la gravajn lokojn ligitajn al la vivo de sankta Francisko. (mb)



I.K.U.E. VIGLIS DUM LA VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista dum la VK (Virtuala Kongreso de Esperanto, okazinta inter la 17-a kaj 24-a de julio) surpodiis ĉiu-tage (po 55'), sed ĉiam kun aparta temo kaj tiel iĝis unu el la plej aktivaj FA de UEA dum la VK. Krom la prezento de la historio de la 111-jara organizo, estis prezentita la nuna agado.

Al tio aldoniĝis la prelegoj-prezentoj: de la kristanaj libroj kaj kantoj en Esperanto, Espero Katolika, portalo fontoj.net. Unu sesion de ViMF (Virtuala Movada foiro) oni dediĉis al la memoro de Antonio De Salvo (08.06.1942.-21.03.2021). Ni aldonu ke UEA donis en la jaro 2019 al li la Diplomon pro la Elstara Arta Agado. Dum la fakkun-

veno, i.a. okazis la prelego de Milton Paulo De Lacerda "Pri revoj kaj trafaj".

Aldonindas la notico pri la atentigo de la agado de Antonio De Salvo kadre de VEKI 2 (Virtuala kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 7.-14.8.). La temo de VEKI estis ligita al la Esperanto-kulturo kaj Marija Beloŝević prezentis la agadon de Antonio pri la blogo „Esperanto viva“, por kiu Universala E-Asocio en la jaro 2019 donis al li la diplomon pri Elstara Arta Agado.

Certe la aktiva partopreno en la movadaj kongresoj estas bona okazo, ke aliaj ekkonu IKUE. Krome, tio kontribuas al la ekstera agado, kiu ankaŭ devus esti grava kampo de IKUE. (mb)

85 JAROJ DE LA MARTIRECO DE JOAN FONT GIRALT, PREZIDANTO DE IKUE

Rerigardante al la 20-a jarcento, ni povas konstati, ke krom la rapidega modernigo de la socia vivo ĝin markis granda sufero kaŭzita de la totalitaraj reĝimoj. De ili suferis ankaŭ esperantistoj. Pri iuj ni scias, memoras gravajn datrevenojn, dum aliaj restis historie kaŝitaj kaj nur de tempo al tempo oni parolas pri ili. Al tiu lasta grupo apartenas Joan Font i Giralt, kataluna pastro, viktimo de la Hispana milito. Viktimoj de la milito krom li estas: Frederic Martí Albanell, paroĥestro en Colonia Güell (mort. 1936 aŭ 1937), Andreu Marcé Espigul, paroĥestro en Sant Jaume dels Domenys, Fidell Orobitg Vila, paroĥestro en Campins, Ramon Arrufat Mestres, beneficulo en la baziliko de Sant Josep Oriol, Barcelono kaj Miquel Soy Pladeveya, Sch. P.,



profesoro ĉe la Piaĵ Lernejoj en Matarò (mort. 1937).

Ĉi-tie ni apartan atenton donas al Joan Font i Giralt. En la Enciklopedio de Esperanto ni legas „Font-Giralt Joan, hispano, pastro, prof. en la Seminario-Kolegio de S. Maria del Collel. Gvidanto de la katolika E-movado. Prezid. de IKUE; redaktoro kaj eldonanto de Espero Katolika, de 1932.

Ĉeestinta plurajn UK-jn kaj aliajn kongresojn. Bona oratoro“. (EdE, p. 162).

Li naskiĝis en la familio de Silvestre Font kaj Mariè Giralt en Girona la 4-an de aŭgusto 1899. Li pastrigis en 1924 kaj estis instruisto ĉe la seminario-kolegio de Collell (Girona-provinco). Je la lasta tempo de sia vivo, tamen sen forlasi la instruadon, li responsis pri la paroĥo de Torn. Aparte estas

interesa lia aktivado ene de E-movado. Li eklernis Esperanton dum sia infanaĝo, dank' al sia patro. Li mem rakontis dum intervjuo ĉe Radio Vieno (24.08.1931): „Kiam okazis en septembro 1909 la 5-a UK en Barcelono, mi estis 9-jara knabo. Mia patro lernigis al



mi la lingvon iomete antaŭ la Kongreso. Ĉiam kun fiero mi memoros la momenton, kiam mi salutis la Majstron Zamenhof“. La eblon perfektigi la lingvon li havis jam en la porpastra seminario de Girona, kie funkciis la grupo „Studenta Juneco“ sub la gvido de pastro Josep Casanovas i Genover (1884-1965), profesoro pri latina lingvo kaj prezidanto de la grupo „Ĝirona Espero“.

Oni elektis lin prezidanto de IKUE dum la 12-a Kongreso en Asizo en la jaro 1927. Post la kongreso li al la IKUE-anoj adresis la leteron, kiun oni povas legi en *Espero Katolika* n-ro 34/1927. En la letero li donis iom da informoj pri si mem, sed ankaŭ klarigis la la ĉefajn agpunktojn de IKUE. „De la tempo de mia infanaĝo, de la jaro 1909, mi estas esperantisto, kaj de la jaro 1920 mi laboras en unu aŭ alia grava posteno en esperantistaj societoj aŭ organizaĵoj. De tiu ĉi jaro 1920 al Esperanto mi oferdonis mian tutan libertempon kaj mian tutan entuziasmon. De nun tiu libertempo, tiu entuziasmo estos tute por IKUE; al ĝi mi volas ilin dediĉi. La celo de tiu ĉi mia laboro estos – ĉar tiel devas esti – unue la disvastigo de Esperanto inter la katolikaro; sed ankaŭ, ke neniuj katolika esperantisto restu for de niaj vicoj, ke IKUE

estu vere la Unuiĝo de ĉiuj katolikaj esperantistoj. Helpu Dio, ke tiel okazu!“

Kun apartaj sentoj li komentas la signifon de lia elekto en Asizo. „La tagon, kiu sekvis tiun de la elekto de la prezidanto, mi povis fari Meson en la tombo de sankta Francisko. Kaj en tiu ĉi Meso fervore mi petis al mia Patro – mi, la malinda membro de lia Tria Ordeno – ke, ĉar mi estas elektita en Asizo kaj en kongreso okazinta en tiu ĉi urbo honore al li, ke li benigu de Dio mian agadon, kaj ke li donu al mi franciskanan senton: la senton de tutkora submetiĝo al la Romkatolika Eklezio kaj la senton de vera kunfratiĝo kun ĉiuj homoj. Aŭdu, Patro, la preĝon de via filo, kaj via devizo: « Paco kaj bono » estos disvastigata en la tuta mondo“.



La estraro de IKUE dum la 14a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso en Prago, 1929. De maldekstre: Marie Larroche, Joan Font i Giralt, Paulus Antonius Schendeler

Dum lia prezidanteco okazis gravaj antaŭenigoj en IKUE mem. Certe indus pli esplori kaj pri konigi ilin (ekz. La aliĝo al la Festo de la Papa Tago, 1928).

Interesan rimarkon li notis pri sia vojaĝo al la 14-a Kongreso de IKUE (EK, 69/1929): „Mi iris de Hispanujo al Praha kaj revenis. Tio estis por mi longega vojaĝo, kiu permesis al mi interkonatiĝi kun multegaj eŭropaj landoj. Mi devis trapasi Francujon, Italujon, Jugoslavujon, Aŭstrujon, Ĉeĥoslovakujon, Germanujon, Svisujon, kaj denove Francujon. Mi devis lerni la kurzon de la franca franko, de la liro, de la dinaro, de la aŭstra ŝilingo, de la ĉeĥa krono, de la marko, de la svisa franko kaj viziti naŭ fojojn la doganojn kaj montri deksep fojojn la pasporton!!! Kaj mi povis konstati, ke la granda baro por la alproksimiĝo de la popoloj estas la lingva baro“.

En la jaro 1931 li partoprenis la 23-an UK en Krakovo, kie li gajnis la 1-an premion en la oratora konkurso. Li ankaŭ prezidis kelkajn el la „Floraj Ludoj“ en Esperanto de Katalunio.

Ke li tiam estis grava persono en la E-movado pruvas la fakto „ke Kálmán Kalocsay priskribis ankaŭ lin en siaj „Rimportretoj“, galerio de Esperantaj steloj (1931):

Font Giralt, ĉarma korpulento,
Ruĝetaj vangoj gaje ŝvelas.
Humoro lia sune helas,
Sed malamikas al silento.

Per nebridebla elokvento
Li do senĉese ĝin forpelas,
Font Giralt, ĉarma korpulento,
Ruĝetaj vangoj gaje ŝvelas.

Prezidas li kun diligento,
Kaj ĉarmas, eĉ se li kverelas,
Kaj eĉ, se gaje li fabelas
Kun forta kataluna sento...

Font Giralt, ĉarma korpulento.

En januaro 1932 li transprenis la redaktaĉdon, administradon de Espero Katolika, kiun li ankaŭ proprakoste eldonis. Enkonduke li skribis: „Sendube vi, kara leganto, miris ricevante el hispana lando la unuan numeron de nia kara oficiala organo kaj, vidante la nomojn sur la koverto, via miro kreskis. Sed ni volas kredi, ke tiu ĉi miro ne estos tro granda, ĉar vi rememoras la neregulan aperadon de EK dum la pasinta jaro kaj vi konas la fakton, ke la iama glora ESPERO KATOLIKA, la plej malnova el la esperantistaj gazetoj, fariĝis kvazaŭ la Cindrulino de la Esperanto-gazetaro... Kaj tion ni ne povis plu suferi. Ni ne povis vidi sendolore la malfortan vivon de nia oficiala organo de IKUE. Ni ja bezonas fortan, regule aperantan organon, kiu alportu al nia anaro dise laboranta, la varmon koran, la enkuraĝigon, la aprobon, la konvenan direktilon“. La revuon li eldonis ĝis oktobro 1934, kiam la eldono abrupte ĉesis kaj li eksilentis. Fakte, nur poste oni eksciis, ke tiam komencis lia „kalvario“. Li malsaniĝis, kaj komence de la jaro 1935 post la operacio li revenis al la seminario de Collell por daŭrigi siajn okupojn kiel profesoro. Meze de aŭgusto 1936 li estis kaptita. Oni forhakis liajn manojn kaj bruligis lian korpon, la 17-an de aŭgusto 1936, sur la vojo de Collell al Girona. Do, li martire mortis kiel viktimo de la Hispana enlanda milito.

Lia nomo troviĝas en la listo de la martiroj de la diocezo Girona (1936-1939). Parolante pri esperantistoj viktimoj de la Hispana milito, oni ne forgesas lian nomon. Menciindas la prelego „La utiligado de Esperanto dum la Hispana intercivitana milito“, kiun okaze de la Kongreso pri Civitana Milito (Madrido, 27-29/11/2006) prezentis Toño del Barrio kaj Ulrich Lins. Same la nomo de Joan Font i Giralt estas menciita en la libroj „Esperanto en Katalunio (1887–1987) kaj „Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro“.

Kiel jam menciite, dum lia vivo Kalocsay listigis lin inter la Esperantaj steloj,

kaj dum nia tempo li aperas en la libro „Nia diligenta kolegaro, Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj“ de Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov (Sezonoj, Litova E-Asocio, 2018). Sekve, okaze de la 85-jara datreveno de lia martira morto, necesas, ke IKUE pliprofundiĝu en la studo pri lia vivo kaj kontribuo ne nur al la katolika, sed ankaŭ la ĝenerala E-movado. Pri la unuaj paŝoj oni jam parolis dum ĵus okazinta Virtuala Kongreso de IKUE. Interalie estas plano kontakti la Diocezon de Girona kaj sciigi, ke ni, katolikaj Esperantistoj, ne forgesis lin.

Marija Beloŝević



DIPLOMO PRI ELSTARA AGADO DE UEA AL MARIJA BELOŠEVIĆ

En la Fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estis anoncitaj 14 ricevantoj de la Diplomoj pri Elstara Agado kaj pri Elstara Arta Agado, aljuĝataj ekde la jaro 2007.

Inter la 14 elstaraj agantoj diplomitaj troviĝas ankaŭ Marija Beloŝević, prezidantino de IKUE. Universala Esperanto-Asocio premiis ŝin pro la Elstara Agado por la Internacia Lingvo Esperanto.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | EN OFICIALAJ RILATOJ KUN UN KAJ UNESKO

DIPLOMO PRI ELSTARA AGADO

PER TIU ĈI DIPLOMO UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
PREMIAS



Marija Beloŝević

PRO ELSTARA AGADO POR LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

2^a VIRTUALA KONGRESO
DE ESPERANTO

2-A VIRTUALA KONGRESO (VK) DE ESPERANTO, LA 24-AN DE JULIO 2021.

17-24 de JULIO 2021

Duncan Charters

DUNCAN CHARTERS
PREZIDANTO DE UEA

MORALAJ ERAROJ DE RUSUJO

Multaj nuntempaj katolikoj malbonigitaj per novpagana spiritostato ne komprenas, aŭ ne volas ekkompreni, ke la moralaj eraroj, kontrabanditaj al la reganta sistemo en iu ŝtato, povas neniigi tutan socion. Sufiĉas tamen trarigardi la historion de la estinta Soveta Unio por havi la plej esprimplenan ekzemplon por la apogo de ĉi tiu tezo...

La vortoj de Dipatrino eldiritaj en la jaro 1917 en Fatima estas samsignifa: *Rusujo disvastigos siajn erarojn en la tutan mondon.* La eraro - tio estas la fuŝformigo, kripligo, io, kio deflankiĝas de la ĝusta vojo.

Kiu povas disvastigadi eraron? Por respondi ĉi tiun demandon, ni utiligu analogion. Infekta malsano disvastiĝas per la personoj plej infektigitaj. Logike estas, ke tiu, kiu estas plejmulte infektigita, plej forte sentas la rezultojn de malsano. Do samtempe li/ŝi estas la suferinto kaj portanto de la malsano, povanta kontribui al ĝia disvastigado. Laŭkutime la infektita persono ne volas infektigadi aliulojn, li/ŝi devus esti senigita de la homaj sentoj, por deziri infektigadi per la malsano, kaŭze de kiu li/ŝi mem suferas. En la kazo de moralaj eraroj estas inverse. Al iuj ne sufiĉas farado de eraroj kaj suferi ĝiajn rezultojn. Ili estiĝas specifaj „apostoloj“ de eraro. Ili deziras, por ke aliajn renkontu la sama malfeliĉo.

Do, sekve, Dipatrino avertadis, ke Rusujo dum multaj jaroj tra la tuta lando disvastigados erarojn, kio estas la memkomprenebla malbono. Ĉi tie tamen aperas la demando: ĉu rusaj viziuloj sciis, ke komunismo estas la eraro? Ĉu eble ili agadis en la bona kredo, gvidataj per mistifikoj



Kamarado Lenin PURIGAS teron de malpuraĵoj

pri socia kaj ĝenerala justeco kaj universala paco? Por respondi ĉi tiun demandon, ni rememorigu iom da historio.

Rusujo: ekde malprogresemo ĝis disfalo

Kiam Dipatrino aperis en Fatimo en majo de la jaro 1917, en Rusujo ankoraŭ ne regis bolŝevistoj. Sub tiranismo de komunistoj ĝi iĝis nur ekde la oktobra revolucio.

Rusujo dum la cara periodo estis miksaĵo de splendoro kaj malprogresemo, pasivo kaj deziro de konkeroj, ebria fatalismo kaj bonegaj revoj pri grandeco.

Historiistoj estas nun interakorditaj, ke malgraŭ multaj malvirtoj, antaŭrevolucia Rusujo sekvis la vojon de la materia pro-

greso, kaj se ĝi sur ĝi postrestus, ĝi estiĝus unu el la plej grandaj potencoj en la mondo. Oni devas plu menci, ke en la jaro 1917 Rusujo estis unu el la landoj kun la plej granda nombro de naskiĝoj, en kiu divorco estis malpermesita kaj leĝo protektis la tradician familion.

Kun alveno de komunismo tio ĉio ruiniĝis. Kiel la defendantoj de la morala toleremo, bolŝevistoj akceptis interalie la leĝojn preferantajn tiel nomatan liberan amon sen iuj ajn devoligoj kaj divorcon.

En la jaro 1920 dum la regado de Lenin Rusujo - kiel la unua ŝtato en la mondo - legaligis la krimon de abortigo. La rezultojn de ĉi tiu malfeliĉa decido oni ne devis longe atendi: multaj divorcoj draste reduktis nombron de familioj, en kiuj krome la nombro da infanoj estis limigita pro malstabileco de geedziĝoj, profesia situacio, loĝkondiĉoj aŭ la kaprico de gepatroj.

Plagon kaŭzis kanajlaro de malplenkreskuloj, kiuj fuĝis el orfejoj. La maturiĝanta generacio ne sciis, kion signifas la estimo rilate al aliuloj.

Krimeco kaj la demografia dramo kaŭzis, ke Stalin en la jaro 1936 ŝanĝis juron kaj malpermesis abortigojn. Ĉar ne estis tio ebligita surbaze de moralaj aspektoj, sed nur pro la socia kaj politika profito, mallonge post la dua mondmilito la abortigoj denove estis legaligitaj, ŝajne kiel iuj elementoj de



ANTAŬEN AL VENKO

la „progreso“. La situacio estiĝis do ankoraŭ pli malbona...

Dekadenco de Sovetunio

En la polica komunisma ŝtato sufiĉis denunco, por ke estu deportita kiu ajn al Siberio aŭ lokigita ĉe la strato Lubianka (la sidejo de KGB - la ŝtata polico). Ni povas do imaĝi, kiom da personoj tuŝitaj per divorco aŭ lasitaj flanke de kunedziĝinto utiligadis tiun eblon por revenĝi. En la sovetia Rusujo la denuncado atingis tiajn dimensiojn, ke homoj izoligadis sin reciproke pro la timo antaŭ perfido. Tiu aĉa dubveka procedo flo-

ris eĉ en „normalaj“ familioj, kio kaŭzadis ankoraŭ plian dekadencan.

Dum miaj vizitoj en respublikoj de iama Sovetunio mi povis observi tragikajn rezultojn de ĉi tiu politiko. Homoj apenaŭ rememorigas al si, ke ili havas geonklojn, ne konas nomojn de siaj geavoj nek scias, kie estas iliaj gefratoj. Troige plenaj orfejoj, bandoj da junecaj krimuloj sur stratoj, komuneca alkoholismo, la bildoj de junulinoj kun botelo da alkoholaĵo en mano je la deka matene estis nenio malofta. Ne rememorigante pri tio, ke en Rusujo multaj homoj tro frue foriras el ĉi tiu mondo, ĉefe kaŭze de malsanoj ligitaj kun ebrieco aŭ mortante je AIDOSO, kio atingis la alarmigitan nivelon.

Ĉiujare la nombro de loĝantaro malkreskas, kaj registaro ne scias, kiamaniere evitigi tion. Kontraŭgravediĝado estiĝis la nacia plago. Ĉiam pli grandaj teritorioj de Siberio estas okupataj fare de kontraŭleĝaj migrantoj kaj fraŭduloj interalie el Ĉinio. Manko



Pligilo kaj martelo - la samsangaj fratoj

de estimo kaj ekzistanta indiferenteco estas tre senteblaj, ne menciante tion, ke la persona kulturo de multaj personoj staras sur tre malalta nivelo. Junaj homoj ne estimas oldulojn, ĉiuj tre ofendiĝadas multmaniere kaj kaŭze de kiu ajn kialo. Eĉ en komerco vendantoj ne estimas aĉetantojn, kaj ĉe iuj regas neglektemo. Sur vasta teritorio de ĉi tiu grandega lando estas nekonata la komerca normo diranta, ke *kliento ĉiam pravas*.



„La eraroj de Rusujo“ multoblighis...

Nuntempe ni ĉiuj vidas, ke la antaŭdiro de Dipatrino en Fatimo rilate al Rusujo efektiviĝis. La moralaj eraroj de Rusujo el la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento (abortigoj, divorcoj, senkondiĉa batalo kontraŭ religio kaj kristana moralo) danke al la sovetiaj decidantoj estiĝis nun io ĝeneraliga en la tuta mondo.

Ni ne havu iluziojn, ke eraroj, kiuj kontribuis al la politika, ekonomia kaj morala ruiniĝo de Rusujo, ne estos la kaŭzoj de la tragikaj sortoj ankaŭ de la landoj, kiuj ilin akceptis. La ununura eliro el ĉi tiu situacio do estas la reveno al la valoroj de katolikismo. Aliaj solvoj ne ekzistas.

Utiligante la riĉecon atingitan danke al nafto, la rusa registaro provas fari diversajn

solvojn por renversi ruinaĵojn, la tragikan heredaĵon post komunismo. Ĉiuj tiuj penadoj dume estiĝis senrezultaj. Ĉar mono ne garantias la revenon de moraleco, kiu estas la frukto de religio.

La Dipatrino el Fatimo, kiu avertis nin antaŭ la disvastigado de „la eraroj de Rusujo“ en la tutan mondon, subtenu nin per sia graco, por ke ni povu ilin elŝiri kun radikoj kaj forĵeti el niaj landoj. Ni petu Ŝin por la rapida konvertiĝo de Rusujo.

Valdis Grinsteins

*Transprenita el dumonata revuo
Przymierze z Maryją, n-ro 77, jaro XIV.
Esperantigis Stanisław Śmigielski*

NI IOM RIDU

La sakristiano ne kredas al siaj okuloj. La sinjorino Majer genuas en la benko, antaŭ si ŝi havas preĝlibreton kaj apude dentan protezon.

„Ĉu eble ĝi vin dumpreĝe ĝenas?“, scivoleme demandas la sakristiano.

„Tute ne, tiu ĉi dentaro apartenas al mia Emil. Mi devis ĝin de li preni, por ke li dume hejme ne formanĝu tutan potkukon.“

Post prediko venas al pastro sakristiano kaj kun aŭtoritato propra al lernejservistoj kaj sakristianoj lin mentoras:

„Hodiaŭ vi la predikon iel fuŝfaris, sinjoro paroĥestro. Eĉ mi do ĝin komprenis!“

Moseo reveninte el monto Sinaj diras al sia popolo: „Mi havas por vi unu bonan kaj unu malbonan sciigon. Tiu bona estas, ke el sesdek ordonoj mi finfine pribabilis nur dek. Kaj la malbona estas, ke la sesa ordono tie restis.“

LA MIRAKLA PERADO DE MARIA – LA IMPERIESTRINO DE ĈINIO

Ĉinio estas lando, kiu heredis „erarojn de la soveta Rusio“. Sed tio estas ankaŭ la granda espero de la Eklezio. En la jaro 2014 la regantoj en Pekino maltrankviligitaj per la informoj, ke katolikoj estas tie plinombraj ol komunistoj, laŭvice kelkfoje komencis brutalajn agojn de detruado de sanktejoj kaj arestadon de episkopoj de la tiel nomata subtera Eklezio. Malgraŭ tio la kredo floras, precipe la Maria-kulto disvastigita en la 16-a jarcento fare de fratoj jezuitoj. Senmakula – al kiu turniĝadis la fidela ĉina popolo – kelkfoje respondis al ĝia vokado pri helpo per surprizaj mirakloj.

Unuafoje la kristanaj misiistoj aperis sur la teritorio de Ĉinujo en la 7-a jarcento. Ses jarcentojn pli poste venis tien franciskanoj kaj dominikanoj. La plej grandajn sukcesojn atingis tamen la jezuita misio en la 16-a jarcento gvidata fare de Patroj Mateo Ricci, Johano Adamo Schall kaj Ferdinando Verbiesto. Patro Ricci estis proksima konvertigi la imperiestron Wanli el la dinastio Ming, kiu donacis al Eklezio terpecojn. Staras sur ili nun la Norda Katedralo de Pekino (Beitang). En la dua duono de la 19-a jarcento en la Ŝtato de Mezo estiĝis pli ol 7 mil misiaj lernejoj, inter ili kelkdekoj da universitatoj. Kiam en la 19-a jarcento al iamaj teritorioj revenis jezuitoj, ili estis mirigitaj, aŭdante la konatan Maria-kanton kantantan fare de fiŝistoj kaj iliaj familioj...

Ave Maria apud la rivero Jangci

El la raportoj de monaĥoj, kiuj venis en la ĉirkaŭaĵojn de Blua Rivero (Jangci) ni informiĝas, ke ĉiam senĉese ili renkontadis la fiŝistajn boatojn, el kiuj dissonadis la kanto Ave Maria, kantata laŭkutime flanke de patrinoj kaj kantata volonte flanke de infanoj, movigantaj remilojn aŭ eltenantajn la fiŝretojn.

Ĉinoj havas la eksterkutiman diservon al la Plejsankta Virgulino Maria – deklaradis misiistoj. En ĉiu situacio, en ĉiu kazo kaj ĉe ĉiu okazo ili rifuĝas al Ŝi. La plimulto de preĝejoj estas konsekritaj al Maria – ili informis. Danke al misiistoj en „lando de dia-

blo“ – kiel ili nomadis la ĉinan imperion – ili enkondukis unu-edzecon (monogamion) kaj instalas centojn da centroj de helpado. La procedon de kristanigado grave malfortigis „la ribelo de pugnoluktistoj“, la satanisma sekto, kiuj ekigis ribelon kontraŭ eŭropanoj kaj kontraŭ ĉio, kio estas la eŭropeca responde al rimedoj de politiko de britaj kaj germanaj koloniistoj.

Maria – la Imperiestrino de Ĉinujo, nomata Blanka Damo, tamen ne forgesis siajn fidelajn infanojn. Tiel, kiel svedoj en Ĉen-



stoŭova (Częstochowa) dum sieĝo de la klarmona monaĥejo, tiel ankaŭ en kelkaj loĝlokoj de la fora Ĉinujo la hordoj de sovaĝaj kaj malsaĝigitaj rebelantoj vidis sur la muroj de katolikaj sanktejoj la Blankan Damon tenanta glavon, kiu plenigadis ilin per granda timo. Jen la historio de la savo de pli ol 3 mil ĉinoj, kiuj rifuĝis en la francan misiejon dum la ribelo de „boksistoj“.

„Boksistoj“ – la satanista sekto

Per la nomo „boksistoj“ oni difinas la asocion titolitan „Pugno nome de justeco kaj paco“, la malamikeman rilate al Eklezio, strebinta renversi la dinastion Qing. Ruzece utiligante malkontenton de la plimulto de socio, indignanta pro politiko de koloniistoj, en la jaro 1898 ekiniciatis la ribelon en la nord-orienta parto de la lando. La nomo „boksistoj“ devenis el la batalarto kultivigata fare de la membroj de la sekto, kiuj volonte subiĝis al ŝamanaj praktikadoj. Antaŭ

la batalo ili narkotigis sin per opio eniĝante en trancon.

En lastaj jaroj de la 19-a jarcento en Ĉinujo okazadis vico da kataklismoj, interalie superbordiĝoj de Flava Rivero, poste sekvis dujara sekeco. La profetoj de budhanaj kaj taoismaj sektoj la kulpon de ĉi eventoj aljuĝis al fremdlandanoj. Ili akuzis ilin, ke konstruante fervojojn kaj malfermante minejojn, ili perturbas la ritmon de la naturo. Rezulte de rikoltomanko en la lando, kie la plej granda parto de la socio sin vivtenadis per laboro en kamparo, elkreskis grandskale krimeco. La kamparanoj timantaj la invadojn de ŝtelistoj, ofte konfidadis defendojn al sekretaj asocioj. Ĉi tiuj plej ofte utiligadis la streĉitan situacion instigante al ribeloj, ĉefe kontraŭ misiistoj kaj konvertitaj ĉinoj. La ekzisto de kristanoj vekigadis antipation ĉe la membroj de sektoj, ĉar ili ne praktikadis la kulton de prapatroj, ne havis konkubinojn kaj ne laboris en dimanĉoj.



La ribelantojn apogis lokaj regantoj, kaj eĉ la parto de aristokrataro, vidante en kristanoj la minacon por konfuceisma ordo. La ĉina nobelaro volis ekspluatigi kamparanojn por forpeli el la lando ĉiujn fremdlandanojn. Junie en la jaro 1900 „boksistoj“ sieĝis la katedralon de la Plejsankta Maria Virgulino en Pekino – la tiel nomatan Nordan Katedralon. La defendon gvidis tiama franca episkopo Petro Marie-Alphonse Favier, lazaro. La patro Favier skribis taglibron dum la sieĝo, doninte per tio la vivan ateston de tio, kion li mem travivis dum la daŭro de pli ol du monatoj – ekde la 15-a de junio ĝis la 15-a de aŭgusto 1900 dum la senĉesa pripafado. Se ne ekzistus efika ŝirmado fare de la Senmakula, la Reĝino de Anĝeloj kaj Helpantino de misiistoj, ili kune kun tri mil konvertitaj ĉinoj estus amasmortigitaj.

Post falo de la ribelo, la episkopo Favier – la apostola vikario de Pekino – alkonstruis la dankan kapelon en la katedralo honore al la Dipatrino Liberigantino, bildigitan kiel Imperiestrino de Ĉinujo, kiu en brakoj tenas la etan princon – la Infaneton Jesuon.

Pri „boksistoj“ la episkopo Favier skribis: „Tio estis vere la sekto de satano. La alvokoj de diablo, sorĉadoj, obsedoj, kaj la implikoj estis inter ili praktikataj. La fakuloj asertis, ke iliaj eksterordinaraj kapabloj estis eblaj nur danke al magio aŭ hipnoto. Kelkfoje ili aspektis kiel ofero de la amasa histerio kaj fanatikeco. Oni asertadis, ke boksistoj estis senperaj iloj de diablo. Malamikeco al ĉio, kio estas katolika – eĉ al la vorto „katolika“ mem – puŝadis ilin al la plej malbonaj friponaĵoj. La ribelantoj instaligis en ĉiu vilaĝo donante signalon por atako de la katolika setlejo, detruante kaj mortigante ĉion kaj ĉiujn. Ili kompatas neniun: etajn infanojn ili kvaronigis, virinojn ili bruligis vivajn en sanktejoj aŭ trapikadis per glavoj, virojn buĉadis per tranĉiloj aŭ pafmortigis kaj iujn eĉ krucumadis. La sinteno de katolikoj estis mirinda. Al postulo de apostatiĝo ili respondis per martireco.“




La helpo de la Mirakla Sinjorino

La Nordan Katedralon pripafadis senĉese dum du monatoj ĉirkaŭ ses mil „boksistoj“, apogataj flanke de soldatoj de regula armeo. Malantaŭ la muroj kaŝiĝis pli ol tri mil ĉinaj katolikoj kaj tridek francaj maristoj, kiujn komandis 23-jaraĝa leŭtenanto Oliverim kaj multnombraj francaj kaj ĉinaj sacerdotoj, kaj ankaŭ monaĥinoj.

Rezulte de ĉi tiu sieĝo pereis pli ol 400 kristanoj; la viktimoj estus pli multaj sen la helpo de la Mirakla Sinjorino. La fidelaj filoj de la Eklezio mortadis ne nur pere de kugloj, sed antaŭ ĉio pro malsato. Ili mortis ankaŭ kiel la viktimoj de epidemio de variolo.

En la jaro 1901 la episkopo Favier post la alveno al la familia klostro en Parizo raportis: „Tio estis vere bonega maniero de la defendo de la katedralo en Pekino, ĝiaj 1400 metrojn longaj muroj pere de kvardek francaj kaj italaj maristoj – sen pafiloj – kontraŭ kvin aŭ ses mil fanatikaj ĉinoj, helpataj de granda artilerio. La kuraĝo kaj kapabloj de



ilia gvidanto – leŭtenanto Paŭlo Henry, la brava homo kaj profunda kredanto, mortigita pere de kuglo la 30-an de julio – kaj ankaŭ la heroeco de la grupeto da defendantoj ne sufiĉas por klarigi la du monatojn venkigan reziston kontraŭ malcedema kanonado kaj furiozaj atakoj de malamiko. Kiel ni povas klarigi tion? Ĉiunokte dum ĉi tiuj du monatoj de la sieĝo ĉinoj okazigis la fortan pafadon al la tegmento de la katedralo kaj al la balustradoj ĉirkaŭ ĝi. Kiel do tion klarigi? – pripensis Paŭlo Henry kaj misiistoj. Ja tie estis neniu, kiu defendus la sanktejon. Post liberigo paganoj donis solvon de ĉi tiu enigmo. Ili miris, kiel tio eblas, ke ili ne vidis Blankan Damon, kiu promenadis laŭlonge de la tegmento kaj balustradoj ĉirkaŭigita de blankaj soldatoj kun flugiloj. Boksistoj estis konvinkitaj, ke ili pafadis kontraŭ ili.“

Kiel poste okazis, kiam ajn la misiistoj estis defendantaj, la paganoj vidis Blankan Damon, kiu gardis siajn infanojn. Sub la blua mantelo de la Senmakula la rifuĝejon trovis

la piaj kamparanoj kune kun siaj familioj el iliaj vilaĝoj situantaj en la orienta parto de la lando.

La misiisto, kiu plenumis mision en Tienĉin, sciigis en junio 1900, ke en multaj lokoj dum la ribelo la boksistoj, paganoj, vidadis Dipatrinon inter kristanoj. Maria ankaŭ mem kondukis al ĉielo animojn de la viktimoj, danke al kiuj venos iam la konvertiĝo de Ĉinio kaj la triumfo de la Eklezio.

Dum atendado je nova imperiestro

Post la ribelo, kiu rezulte de la interveno de fremdaj landoj, ĉefe eŭropaj, finiĝis en Pekino la 15-an de aŭgusto 1900 – en la festo de Ĉielenpreno de la Plejsankta

Virgulino Maria – al la sanktejo Beitang venis multaj pilgrimantoj. En la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la 20-a jarcento la Norda Katedralo estiĝis la vera Lurdo de la nord-orienta parto de Ĉinio.

En pli postaj jaroj la papo Pio la Dekunua kaj poste lia sekvanto Pio la Dekdua establigis la eklezian hierarkion en Ĉinio. Pli poste Ĉinio estis infektita fare de komunismaj „eraroj de Rusio“, kaj post la venko de la revolucio de Mao Zedong en la jaro 1949, la situacio de la Eklezio denove dramece malboniĝis. Ĝis nun la ĉinaj kredantoj batalas por la konservado de la kredo. Nun en la Mezŝtato estas pli ol cent milionoj da kristanoj, el kio 12 milionoj da katolikoj. Ili estas certaj, ke iam ekregos en ilia lando la nova imperiestro – Jesuo Kristo.

Agnieszka Stelmach

*Transprenita el revuo Przymierze z Maryją,
n-ro 83, jaro XV. Ilustris Jacek Widor
Esperantigis Stanisław Śmigielski*

LA ĈIELARKA IDEOLOGIO DE OKCIDENTO

Rasbatalo, klasbatalo, seksbatalo – la skemo estas la sama, ŝanĝiĝas nur la subpremita socia grupo, kiu devas iĝi liberigota danke al la kadra organizo de konsciencaj aktivuloj.

Por niaj okuloj la dominanta ideologio de la nuntempa mondo de Okcidento iĝas genderismo. Ĝi sin apogas ĝuste per la sama dankema skemo kiel nacia socialismo kaj komunismo. La diferenco konsistas nur en tio, ke la batalo de rasoj aŭ klasoj estis

anstataŭigita per la batalo de seksoj.

Ĉe la fontoj de ĉi tiuj tri ideologioj estas la historio-filozofia vizio, konsente kun kiu la historio de homaro estas la procedo de la konstanta emancipigado de premigitaj sociaj grupoj.

La morala supereco de viktimoj

En la nacia socialismo (do en la socialismo, en kies centro troviĝas nacio) tia maljustigita komunumo estis la germana nacio. Laŭ la opinio de naziistoj ĝi estis maljuste pritaksita fare de la humiliga Versajla Traktato, kiu devigadis la grandegan militan kontribucion, la perdon de teritorioj kaj la senkondiĉan plutokration. Al tio aldoniĝadis judoj, kiuj organizis kontraŭ germanoj komploton. En komunismo la nedotita socitavolo estis laŭvice la laborista klaso, senkompate ekspluatata fare de burĝaro, kapitalistoj, industriistoj kaj bankistoj. Nuntempe la rolon de proletaro, kiun oni devas liberigi el katenoj de la hegemonia sistemo, okupas subpremataj seksaj minoritatoj. Ĝuste ili dum multaj jarcentoj estis molestataj kaj persekutataj fare de la blanka, aliseksema kaj patriarka plimulto. Ĉikanoj kaj reprezalioj havis la sisteman karakteron kaj estis tiel ĝeneralaj, ke al ĉi tiuj minoritatoj estis donita eĉ ne la eblo eldiri sian identecon.

En ĉiuj tri menciitaj kategorioj la statuso de viktimo donis al maljustigitoj la moralan

superecon rilate al persekutistoj. De tio devenis la historia leĝo por revenĝo, kiu estiĝis rekte el la kondiĉo de aranĝo de la justa ordo. La akiron de vivospaco por la aria raso (Lebensraum), la konstruado de la sociordo kun la gvidanta rolo de la laborista klaso, fine socian privilegion de seksaj minoritatoj – tio estas (kondiĉe de la prizorgado de la konvenaj proporcioj) elementoj de la analogia skemo, en kiu la subpremataj grupoj eldevigas la ŝanĝon de la ĝisnuna ordo. En ĉiuj kazoj ĉi tiuj grupoj estas reprezentataj fare de malmultnombraj, sed kapablaj strukturoj, kadraj organizoj de aktivuloj, kiuj difinas la tonon por batalo, antaŭvidas celojn, entrudas pritrakton.

Iam oni pli ofte ĉe tio praktikadis senperan premdevigon. Nun – kiel rimarkas Chantal Delsol – oni atingas la saman rezulton uzante „iun psikologian kaj moralan formon de premo: diversajn specojn de influado, hontigado kaj malkuraĝigado, kaŝitajn aŭ publikajn ekonomiajn minacojn, influadon per hontigaj premoj ktp.“

En lando de la sciencaj mitoj


La baza pretendata artifiko estas referenco al scienca argumento. La agantoj de menciitaj movadoj asertas, ke ili ne reprezentas ideologion, sed sciencon. Naciaj socialistoj havis ankaŭ la aŭtoritaton de la tuta plejado da estimataj sciencistoj el la plej renomaj

universitatoj germanaj. Referancante al la antropologiaj, biologiaj, genetikaj kaj medicinaj esploroj, ili pruvadis kun la plena konvinko, ke la germana raso staras pli alte en la hierarkio de la disvolvo de la homa specio ol la slava aŭ la juda raso. Komu-

nistoj laŭvice asertadis, ke marksismo-leninismo, kiu malkovris la leĝojn de la progreso de la homara historio, estas la scienco de la pura formo. Tiel asertadis la multnombra aro da profesoroj ne nur de orientaj altlernejoj, sed ankaŭ de okcidentaj. La similan skemon utiligas la agantoj de la medioj de LGBT, kiuj indigniĝas kaŭze de ĉiu, eĉ la plej eta mencio, ke genderismo estas ideologio. Ili rezolute asertas, ke ĝi havas rilaton kun la scienco, kvankam la tute alirebla biologia scienco diras, ke neniamaniere estas akceptebla teorio pri multeco kaj flueco de la sekso.

Ĉiuj tiuj ĉi ideologioj sin apogas ne nur per sciencaj malkovroj, sed per sciencaj mitoj. En la kazoj de genderismo tio estas la teorio, ŝajne la samsekseco (aŭ la alia „identeco neheteronomia”), ke ĝi estas kaŭzo aŭ denaska, aŭ hereda, aŭ kondiĉita genetike aŭ hormone. Malfacile eblas tion nomi alimaniere ol kiel la teorion naskitan en la 19-a jarcento. Neniaj sciencaj esploroj spite de insistaj klopodoj pruvis ĉi tiun tezon. Verdire de tempo al tempo la mondo estas sensacie informita, kvazaŭ oni malkovris „genon de samseksemeco“, sed rapide tio fariĝas falsnovaĵo.

La scienca mito informanta pri la denaska karaktero de diferencaj seksaj preferigoj tamen estas celkonscie enkondukata en la publikan vivon. Se ni tamen rekonas, ke ĉi tiu sorta orientiĝo estas biologie determinita, kaj ne akirita dum la periodo de maturiĝado, tiam ni starigus ĝin ekster iu ajna kritiko. Ĉar oni ne povas al iu ajn starigi pretendojn kaŭze de tiuj elementoj de lia/ŝia identeco, kiuj ne estas elektitaj, sed denaskaj. Oni povas kritiki iun pro mondkoncepto, preferoj



aŭ konduto, sed ne pro la sekso aŭ la koloro de haŭto. Kiam do la samseksemulo diras: „Mi tia naskiĝis“ aŭ „Dio min kreis tian“, tiam fakte li mem starigas sin ekster iu ajn valoriga pritakso. Oni do ne povas devigi lin/ŝin ŝanĝi sian vivmanieron aŭ rekonii la propran pekon.

La problemo estas en tio, ke malestas la scienca atesto por la verigo de la supra aserto. De alia flanko ekzistas multaj dokumentitaj kazoj, kiam la samseksemeco de junaj knaboj komenciĝis ekde ilia delogo, kaj iufoje eĉ per fikspluato fare de pli maljunaj viroj.

Malsuperigemaj kontraŭaĵoj

Kun la tezo pri la denaska karaktero de „nealiseksaj identecoj“ malakordiĝas disvastigita en la medioj de LGBT konvinko, ke la sekso estas ne tiel biologia faktoro, kiel la kultura procedo kaj oni povas ĝin por

sin mem elektadi. Unue do oni diras, ke la seksa identeco estas kondiĉita biologie („ni tiaj naskiĝis“), kaj aliffoje, ke tio estas la demando de la persona elekto.

Ne estas tio la ununura malkonsekvenco

de la genderideologio. Unu el ĝiaj bazaj dogmoj anoncas la multecon kaj ŝanĝecon de seksoj. Oni povas libere ŝanĝigadi sian sekson, ĉar ĉio restas la demando de la libera elekto, kaj decida estas la konscienco. Se do iu sentas sin malbone kiel viro kaj volas estiĝi virino, li povas veni al kuracisto, kaj tiu estas devigita (ekz. helpe de la enmiksiĝo kirurgia kaj la hormona kuracado) helpi ŝanĝi la seksan staton.

Ĉi tiu regulo tamen ne funkcias en ĉiuj direktoj. En multaj landoj de Okcidento, se iu samseksemulo sentas sin malfeliĉa kaŭze de sia seksa preferiĝo kaj aperas ĉe kuracis-

to, petegante lin pri ŝanĝo de sia orientiĝo, la kuracisto tamen ne povas helpi al li. Ĉi tiu praktiko tamen estas en multaj ŝtatoj malpermesita kaj punigata per monpuno, kaj eĉ per aresto.

La menciita malpermeso estis enkondukita rezulte de premoj de la LGBT-medioj, kvankam – logike pensante – ili devus akcepti ĉi tiun terapion kun entuziasmo kiel konsentitan kun la gender-ideologio. Ni do renkontiĝas kun la konscienca elekto de la homo, kiu volas ŝanĝi sian seksan identecon. Tamen okazas, ke ili ne posedas tian leĝon, se la viro volas forlasi gejsmon.

Junularo - la ramo de revolucio

La postulo de severaj punoj pro la malrespektado de ŝajnaj certigiloj kromalie estas la ripetiga elemento de multaj ideologioj. La kritikado de la premisoj de nacia socialismo estis observata kiel la agado orientita al la reprezentantoj de la pruvita germana nacio. La senmaskigo de la absurdoj de komunismo estis prezentata kiel atenco kontraŭ laboristaro kaj la maljustaĵo farita kontraŭ la peze laborantaj proletoj. Ankaŭ nun la riproĉado de sensencaĵoj de la gender-ideologio konsekvencas la akuzon pro ofendado kaj humiligado de „la LGBT-personoj“. Iuj ajn esencaj riproĉoj estas komprenataj kiel la personaj atakoj.

Ligiĝas kun tio la rifuzo diskuti, kiu povus starigi sub la demandosignon la bazajn elirpunktojn de la dominanta ideologio. Ekde la tempo de renesanco la scienco anoncas, ke nenias asertoj estas akcepteblaj pri la kredo, sed por verigi ilin – oni unue devas ilin subfosi, kaj poste revizii tra la akuratecaj kaj ĉiufankaj esploradoj. Iliajn kriteriojn jam nomis Karl Popper en sia klasika verko „Logiko de la scienca malkovro“. Tiusence la ĉefaj reguloj de la genderismo ne efektivigas Popper-ajn devigojn de sciencismo, ĉar ili ne trairis la similan ateston. Des pli, ke ĉiu pruvo levi kaj kontroli la verecon de la

ĉefaj tezoj de ĉi tiu ideologio estas sufokata en nukleo. Okazas tiel ne nur en amaskomunikiloj, sed ankaŭ en universitatoj, kiuj estis vokitaj por vivo antaŭ jarcentoj kiel la lokoj, kie estas serĉata vero.

Spite la originan mision, tio ĝuste altlernejoj, kaj precipe iliaj fakultatoj humanismaj, estas nun la gvidaj ideologiaj centroj, en kiuj la scienca scio cedas lokon al la utopiaj vizioj de la socia inĝenierarto. En ilia altrudado la plej bona estas la universitata junularo, kiu estiĝas la ĉefa ramo de revolucio. Tiel estis en la Tria Regno, kie la naci-socialismaj studentoj ne permesadis veni al lekcioj malkorekte pensantajn profesorojn, akuzante ilin pri obskurantismo kaj malprogresemo (tio ne estis hazardo, ke komence de la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento NSDAP estis la plej juna partio en la mondo laŭ la aĝo de ĝiaj membroj). Tiel estis en la tempo de komunismo, kiam la partia aktivularo junulara rompadis okupojn de lekciistoj de malnova pensmaniero, akuzante ilin pri bremsigado de la progreso kaj servado al la fortoj de reakcio. Tiel estas finfine en multaj nuntempaj universitatoj, kie studentoj en la nomo de la politika akurateco scipovas turmenti „reakciajn“ profesorojn, gvidante ilin eĉ por ilia eliminado el altlernejoj.

Se ni devus montri la komunan malamikon de pli supre menciitaj movadoj, tio kun certeco estus kristanismo kun sia absoluta etiko, klasika metafiziko, la regulo de la amo por kunulo kaj la instruado pri la sankteco de la homa vivo.

Al la modernaj ideologoj ĝi ŝajnis esti

unu el la apogiloj de la malnova mondo, kiu porĉiame devas malaperi. Kiel la elemento de la malnova reĝimo estas kulpigata sistema maljusteco rilate al subpremataj sociaj grupoj. Tio ne povis estis alimaniere traktita kiel malamika.

Laika surogato de religio

En ĉi tiu optiko oni povas vidi, ke la menciitaj ideologioj estiĝas la laika variaĵo de la religia kredo. Ili oferdonas rekte la surogaton de savo, promesante la eliminon de la bazo de malbono en la mondo. Se do la kristanoj kredas, ke la ĉefa kaŭzo de malbono estas la prapeko, la adeptoj de la marksisma vizio de la historio de la mondo opinias, ke malfeliĉoj estas rezulte de la ekzisto de maljustaj sociaj strukturoj. Ili asertas, ke se oni neniigus ĉi tiujn opresajn strukturojn, tiam estos liberigita la homa naturo el la altruditaj al ĝi limigoj kaj ĝi libere povos realigi la plenecon de sia potenco. La unua generacio de socialistoj rekonadis kiel la toksecan la privatan proprecon, kristanan religion, tradician moralon aŭ la nacian ŝtaton. Ĉiujn tiujn ĉi elementojn de la vivo oni devis por ĉiam konkeri. Iuj laŭ spuroj de Engels aldonadis al tio ankoraŭ la institucion de geedzeco kaj familio kiel la

iloj de ekspluatado de virinoj kaj infanoj.

Nuntempe la procedo de emancipiĝo venis multe antaŭen. Nun kiel la formo de la ekspluatado estas rekonigata la biologia sekso. Lige kun tio falas la postulo, por ke homoj liberigu sin el limigoj, kiujn surmeta-das al ili la naturleĝoj kaj la kreitaĵa homa specieco. Tio estas la vera antropologia revolucio, kiu atribuas al la reprezentanto de la speco homo sapiens la prerogativojn preskaŭ diajn. Malaktualaj estiĝas la vortoj el Libro de Genezo, ke je la komenco Dio kreis viron kaj virinon. Jen ne Dio, sed homo, ne je la komenco, sed en iu momento, kaj ne viron kaj virinon, sed multe da seksoj. Tiamaniere la ordinara mortulo neigas la verkon de la kreado. Kia estos lia/ŝia laŭvica paŝo?

Grzegorz Górny

El Semajnevuo SIECI, 28.06.-4.07.2021.

Esperantigis Stanisław Śmigielski

REIKI - OKULTISMA KURACADO

En kuracado per metodo reiki homo referencas sin al nekonataj spiritaj fortoj - per tio li malrespektas la unuan ordonon de la Dekalogo. Tia agado estas grava peko, ĝi rapide kaj plej forte malfermas homon al demona efikado, kaj tion inkluzive al obsedo.

En metodo de reiki onidire estas eluzata universala viv-energio. Sed fakte estas tiu ĉi praktikado okultisma: konsidere al metodo de efikado kaj fonto de efikeco. La sacerdote Aleksander Posacki SJ, demonologo, faka membro de Internacia Asocio de Ekzorcistoj, konvinkigas: „Ĉio estas tipa por magio, en kiu nepersona ĉiopovo de ritaro estas decidema kondiĉe, ke mem la rito es-

tos farita precize kaj laŭregule, kvankam eble tre eksterece.“ La okultisma rito estas invito de malbonaj spiritoj por helpo. Tiuj al homo volonte „helpos“: donos sanon kaj eksterordinarajn kapablojn, sed kontraŭ grandega prezo – por la animo... Ju pli granda estas peko de fiereco, pli granda konscio de forturno de Dio kaj konscio de farita malbono, des pli granda estas aliro de demonoj al

homo kaj des pli tragikaj estas konsekvencoj de ilia efikado.

Kamufflita danĝero de reiki

Adeptoj de reiki asertas, ke tio estas tradicio de la natura resanigado, kiu ne havas religian karakteron. La Enciklopedio de religio informas, ke tio estas praktikado inica kaj okultisma prezentata kiel natureca „ripoziga, terapeŭtika kaj resaniganta; sistemoj de la natura resanigado apogantaj sin sur ideo de universala energio, kiu estas necesa por vivo kaj estas trafenetranta ĉiujn vivajn organismojn“. Laŭ tiu ĉi metodo malsano estas nesufiĉo de energetika ekvilibro en homo sur nivelo emocia, psika eĉ spirita. Persono praktikanta reiki devas trairi inicon, esti „agordigita“ fare de majstro de reiki kaj pere de mantendo konform-maniere super malsanulo devas redoni al li/ŝi la energian ekvilibron.

Sed fakte la metodo reiki havas klarajn trajtojn religiajn kaj ĝi estas mondkoncepto de monisma karaktero (mondo estas praktike ununura estado, unu principo) aŭ de panteisma (identigo de Dio kun naturo kaj kun okazoj en ĝi troviĝantaj), kunigita kun memdieciĝo, kun spiritismo eĉ kun religia sinkretismo (simpligo, deformigo kaj kunmikso de budhismo kun kristanismo). Dokumento de la episkopara konferenco de Usono (el la 26-a de marto 2009) tekstas: „Homo uzanta teknikon de reiki senmotive, same el flanko de kredo, kiel eĉ el naturscienco, enpaŝas en malhelan spacon de superstiĉo, alivorte en sferon, kiu apartenas nek en sferon de kredo, nek en sferon de scienco.“ Reiki havas nenion komunan eĉ kun tio, kio estas en kristanismo resanigo pere de Dia

graco, eĉ ne kun konvencia kuracado. Ne ekzistas scienca ekspliko, kiamaniere povus esti kuracado pere de metodo reiki efika. Per multaj internaciaj antisektecaj organizoj estas reiki komprenata kiel destrukcia sekto. Atestado de la personoj, kiuj estis implikiĝintaj en praktikadoj de reiki, malkovras ĝian neordinare damaĝantan efikadon.

La vivo en peko ebligis aliron de malbono

Dorota frekventis multajn kursojn de reiki. De sia majstrino ŝi aŭdis, ke ŝi estas favorulino de „monto“. La virino ignoris maltrankviligajn signojn kaj ĉiam pli profunden ŝi eniradis en la mondon de okultismo. Fine doloroj kaj sufero, travivataj kaŭze de malfermiĝado al malbonaj potencoj helpis al


Dorota ekkompreni. Ŝi vizitis ekzorcion por preĝi, en forno ŝi bruligis librojn litigitajn al reiki kaj pluajn materialojn, diplomojn el kursoj, kiujn ŝi frekventis, kaj vektorojn kaj pluajn similajn objektojn ŝi neniiĝis. Finigo de ŝia rilato kun malbono vekis fortigitan atakon de demonoj: „Kiam mi tion faris, komencis en mia vivo sufero. Mi ne povis dormi eble du monatojn.

Lampo en la ĉambro lumis dum tutaj noktoj. Kiam proksimiĝis nokto kaj mi volis enlitiĝi, mi vidis diversajn fantomojn, kiuj alvenadis. Iliajn atakojn mi sensis tiel, kvazaŭ ĉirkaŭ vertebraro, kruroj kaj brakoj sin ĉirkaŭvolvus grandega nom-

bro da serpentoj kaj centoj da kudriloj enpikiĝus en mian korpon. Mi timis antaŭ ĉiu plua nokto. Kiam mi por momento endormiĝis, rapide mi vekiĝis kun malfermitaj okuloj. Miajn familianojn ankaŭ komencis premi noktaj inkuboj.“ En tia situacio estis por Dorota ununura savo turni sin al Dio:



„Tiutempe mi multfoje preĝis rozarion. Tiuj preĝoj kaŭzis al mi gravan malpeziĝon. La ekzorcisto diris, ke mi devas plej baldaŭ rektigi miajn vojojn kaj okazigi sakramentan geedziĝon, ĉar la vivo en peko ebligis al fortoj de malbono larĝan aliron al mi.“ Dorota komencis serioze trakti Dion. Ŝi eksentis potencon de Dia graco fluantan el sakramentoj,



la Sankta Skribo kaj el preĝoj, kaj ankaŭ ŝi konsciiĝis pri pereiga povo de la peko. „Nun mi kun granda dankemo kaj humilo dankas al Jesuo por tio, ke Li elprenis min el manoj de demono. Li montris al mi mian vojon. Lia amo estas senlima. Li nur atendas nian konsenton kaj tuj delikate Li eniras en nian ofte deformitan vivon, kiun Li mem komencas rektigadi.“

En vesto de virŝafo

Katarina post sia konvertiĝo ne havas dubojn, ke malantaŭ metodo de reiki staras demonoj. Partoprenantoj de kursoj de reiki kun enviciĝo en tiujn praktikadojn sin malfermas al efikado de malbonoj, kiuj ĉiam damaĝas al homo. Por ke ili akiru fidon de homoj kaj ilin konvinkigu, tio estas kvazaŭ ĉe bonfaranta efikado de reiki dum kurso, kiun partoprenis ankaŭ Katarina, ili kantis kantojn pri la Sankta Spirito, ĉirkaŭbrakumadis

sin kaj parolis pri tio, ke reiki estas Dia energio... Dum unu kurso gurunio al la ĉeestantoj eĉ diris, ke ili sin turnu al Jesuo. Tia efikado estas karakteriza por New Age, en kiu estas laŭvole kunigataj elementoj de diversaj religioj, ankaŭ de kristanismo, kompreneble ili aspektas tute alie. Sed la koro de Katarina sincere malfermiĝis al Jesuo kaj tuŝis ŝin forto de lia nomo. Kristo altiris ŝian koron al si. Danke al tiu ĉi travivaĵo ŝi ekiris bonan, eĉ se ne facilan vojon de konvertiĝo: „Ankoraŭ mi ĉeestadis meditojn, sed nur mallonge, ĉar mi komencis vizitadi preĝejon. Mi volis esti proksime al Jesuo. Estado kun Li estis por mi agrabla. La purigado daŭris longe kaj ĝi ne estis facila. Mi trairis multajn ĝiajn etapojn. Kiam mi ekpensas, ke mi povus fari paŝon reen, pro teruro mi eĉ ŝvitas.“ Katarina travivis tion, ke nur Dio donas al ŝi liberon kaj plenigon. Ŝi faris ĝeneralan pekconfeson, ŝi fordonis ĉiujn ezoterajn librojn por bruligo al ekzorcisto, atestojn pri frekvento de kursoj, tarot-kartojn... Nun ŝi intense partoprenas en vivo de la eklezio; ŝi apartenas al komunumo, ĉar mem ŝi asertas: „Vizitadi preĝejon nur ĉiudimanĉe ne sufiĉas. Estas necese pli multe engaĝiĝi.“



Dio donis sopiratan pacon

Laŭ atesto de plua persono, kiu rifuzis praktikojn de reiki, la reveno al Dio okazis dum tre dramaj cirkonstancoj. Do la virino konvinkita, ke ŝi povas helpi homojn per

metodo de reiki, ŝi dum seanco akceptis viron, kiu komencis strange konduti post trarigardo de t.n. ŝtonaj cirkloj. Kiam la virino komencis meti sur lin manojn dum elparolo de sigelantaj vortoj, montriĝis ĉe li demono ago. Demonio alterne forlasadis lian korpon kaj denove revenadis en ĝin. Kiam li eluzadis lian korpon, satano provis sufokigi aŭ per tranĉilo trapiki virinon farantan seanon. Tiuj kaj ankoraŭ aliaj teruraj aferoj, kiuj okazadis dum tiu agado, la senkonsilan virinon terurigis. Alimomente ŝi eksentis, ke ŝi devas genuiĝi kaj komenci preĝi rozarion. Tiu ĉi preĝo savis ŝin kaj ebligis al ŝi ekkompreni tutan situacion: „La lukto kontraŭ demono eniranta en la viron kaj denove eliranta el li daŭris du horojn. La malbona spirito kvazaŭ trairadus tra mi (tiam mi parolis per vira voĉo, kio ŝokigis min), aŭ li defrotis sin sur mi (tiam mi sentis frostecan formikan pike-tadon). Mi sentis, kvazaŭ mia korpo estas trapikata per io akra. Ĉiam mi pli konsciiĝis, ke ĉiuj paranormalaj kapabloj, kiujn mi aki-



ris, devenas de la malbona spirito. Ĉio estis peko. Mi komencis peti Dion, ke mi ne mortu, por ne eniri inferon, kaj cetere tiam mi travivadis ĝian fragmenton. Mi volis ĝisvivi matenon, por ke mi povu rapidi al la preĝejo por peti helpon.“ Morgaŭ la virino estis sendita al ekzorcisto. La sacerdoto eksplikis

al ŝi, kiel ŝi dum kelkaj tagoj prepariĝu al pekconfeso. Dum tiu ĉi malfacila tempo la virino senĉese tenis la rozarion en la mano, kiu estis ŝia spirita ŝildo kontraŭ atakoj de



la Malbonulo. „Kiam mi finis pekconfeson, mi eksentis, ke mia koro estas varmego, traplenigita per amo kaj paco. Fine mi trovis tion, kion mi serĉis kvardek jarojn - la Dian pacon.“

Eliĝi el okultismaj praktikadoj estas neniam facila, ĉar la malbona spirito nocive atakas kontraŭ tiuj, kiuj sin eliĝis el liaj manoj. La supre menciita virino tiel rakontas pri ĉi tiu sufero: „Satano ne pardonis. Li atakis min dum kvin jaroj. Komence la plej malbonaj estis noktoj. Demonio enstrudiĝis sin en mian menson, li min timigis, min batis. Mi vekiĝadis timiĝinta kaj bategita, kvankam sur mia korpo estis videblaj neniuj kontuzaĵoj.“ Dum malfacila tempo de purigado, interrompado de ligoj kun malbono estas ununura helpo adheri al Dio, sakramenta vivo, preĝo kaj restado en komuneco de la eklezio. Post liberiĝo el praktikado de reiki virino diris: „Mi ĉeestis ĉiutage la sanktan meson. La konfesejo iĝis por mi io bela, la loko, en kiu mi sentas proksimecon de Jesuo. Ankaŭ mi ekkomprenis, kiel ege satano malamas sacerdotojn, kiuj savas niajn animojn. Mi

ekkonis, kian forton havas rozario. Dio faris en mia vivo multajn miraklojn: Li montris al mi vojon al la eterna vivo, donis sopiregatan internan pacon, plenigis koron per amo, sanigis korpon eĉ animon, donis loĝejon, aŭtomobilon, firmaon kaj multajn aliajn



aferojn, kiuj por mi iam estis neatingeblaj.“

El perspektivo de multaj jaroj de sia senkonscia vivo en la peko direktas la konvertiĝinta virino al ĉiuj kredantoj jenan alvokon: „Ne estas bone indiferente preteriri iun, kiu evidente pekas. La guto trabatas rokon. Eble la atentemo dediĉita al iu tia estos la unua guto, kaj eble ĝi alplenigos pokalon kaj lin konvertos al Dio. La amo de Dio jam faros ceteron.“ Tiu ĉi virino perdis multajn jarojn de sia vivo kaj preskaŭ ŝi damnis sian animon, ĉar ŝi serĉis veron kaj feliĉon sur malbonaj lokoj. Neniu el kredantoj montris al ŝi fonton de la vero, ne admonis ŝin kun amo kaj ŝin ne avertis antaŭ okultismaj praktikaĵoj. Post sia konvertiĝo la virino des pli estas atentema, kiel grave estas dividadi la trezoron de la kredo kaj paroli pri la Dia amo.

Transprenita el Mihujcie się 1/2020

PRELEGO PRI MEMMORTIGO AŬ MEMESTIMO

La 10-an de septembro IKUE aranĝis sukcesan ZOOM-prelegon kun ege malfacila temo „Memmortigo aŭ memestimo?“ okaze de la Monda tago pri prevento kontraŭ memmortigo.

Ĉeestis E-istoj el 13 landoj de Suda Ameriko (Argentino, Brazilo, Ĉilio) kaj Eŭropo (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando, Slovakio) kaj Azio (Koreio).

La prelegantoj sac. Albert Reiner kaj Milton Paolo de Lacerda aliris la temon de eklezia kaj psihologia vidpunktoj.

Dum la diskuto oni substrekis la gravecon de la temo, kiu en la hodiaŭa tempo tuŝas ĉiujn sociojn. Estis prezentitaj ankaŭ kelkaj statistikaj informoj rilataj al la lasta jaro lige al la pandemio, kiuj donas la seriozajn zorgojn, pri kiuj ni ĉiuj devas konscii.

La prelego estis alirebla por ĉiuj, ĉar IKUE i.a. pri ĝi informis per Eventa servo, kio certe kunportis kelkajn partoprenantojn.

La partoprenantoj esprimis kontenton, ke IKUE kompetente aliris la temon.

IKUE estonte planas okazigi similajn fakprelegojn. Tio estas bona maniero kaj pliprofundiĝi en la kredo, sed same montri la starpunktojn de la Katolika Eklezio pri la temoj gravaj por la moderna homo.

Marija Belošević, prezidantino de IKUE